


EL POPOLA

ĈINIO

中國新聞


7 1984






ĈINA EKSPERIMENTA KOMUNIKA SATELITO SUKCESE LANĈITA


Fotoj de LIŬ DONG



Kontrolado de la satelito antaŭ la flugo

La tri-etapa transporta
raketo sur la lanĉ-turo






La raketo tuj antaŭ la levigo






Observado de la
spuroj de la ra-
keto kaj satelito



La lanĉejo

Radara disko laboranta



Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto:
Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Je la 8-a de aprilo Ĉinio sukcese lanĉis eksperimentan komunikatan sateliton, kiu jam iris en difinitan orbiton kaj bone funkcias.

Foto de **LIŬ DONG**

SUR LA DORSKOVRILO:

Lakoplado kun reliefa aĵura florkorbo

de metiartisto **DU BINGĈENG**

La metiartaĵo, kiu gajnis la oran medalon en la Lepsika Internacia Foiro de 1984, estas nove kreita lakogravuraĵo de Ĉinio. Ĝi havas diametron de 50.7 centimetroj. Por fari ĝin, la metiartisto aplikis teknikojn de reliefa, aĵura kaj tri-dimensia gravurado.

KOLORAJ SERIOJ:

Ĉina eksperimenta komunika satelito sukcese lanĉita

Ĝinggang-montaro

Fotoj faritaj de esp-istoj

La verda Julin

Ĉinaj tonikaj pladoj

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La antikva urbo Ĝjangling

La pekin-opero "Verda Majo"

Sindonema flutisto

Sur vojo al la kosmo	2
Fervora studo de sciencoj en la kamparo de Hebej	5
La plej granda kemia minejo de Ĉinio en konstruado	8
Turpan — Smeraldo sub la Flamanta Monto	10
Esplora kaj trejna centro de metano	13
Sude kaj Norde de la Granda Muro (7): Verda "Granda Muro"	46
KURANTAJ AFEROJ	44
Nova disvolviĝo de la ĉina Esperanto-movado	17
Verda Majo sur la pekin-opera sceno	30
POR KOMENCANTOJ: Post kiam infano falis de etaĝ-domo	23
NIAJ PERANTOJ: El mia vivo	22
ESP-NOVAĴOJ	25
Memfarita projektisto	27
Sindonemo de flutisto	31
Familio de sport-amatoroj	33
POR VIA SANO: Malgrasiga terapio por mezaĝuloj	20
Kajtisto Ha en Usono	37
Gasti en hejmloko de grandaj pandoj	35
VIDINDAJ LOKOJ: Pitoreska montaro Ĝinggang	24
HISTORIAJ URBOJ: Ĝjangling — la kultura lulilo de Ĉu-regno	15
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La unuigo fare de Ĵuan-dinastio	39
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉinaj tonikaj manĝaĵoj	45
ĈINLINGVA KURSO: Sepa leciono	42
KORESPONDI DEZIRAS	46

Sur vojo al la kosmo


— Pri la sukcesa lanĉo de la unua eksperimenta komunika satelito de Ĉinio

LA 8-a de aprilo, tago neforgesebla por la ĉina popolo. Sur la ekfluga platformo de la giganta turo majestis laktoblanka transporta raketo.

Estis tempo de lanĉo. En la subtera teleregaĵejo intense laboris komputeroj, trembrilis lampetoj, rapide ŝanĝiĝis la ciferoj sur la televid-

ekranoj... Jen venis de la komputero ordono "Ekbruligu". Tuj sin levis la transporta raketo kun grandega forto. Aŭdiĝis terskua bruego. Kelkajn sekundojn poste, la raketo jam flugis al la ĉielo kun densa fumo ĉe la vosto. La fumo ŝvebis longe en la firmamento... Jen Ĉinio sukcese

Teknikistoj serioze ekzamenas ekipaĵojn.



lanĉis sian propran eksperimentan komunikan sateliton.

La 16-an de aprilo la komunika satelito sin lokis super la ekvatoro je 125 gradoj de la orienta longitudo. Vespere de la 17-a, loĝantoj de la urbo Urumĉi, je pli ol 3 700 kilometroj nordokcidente de Pekino, spektis la televid-programon de la Centra Televido, transsenditan de tiu satelito. Tio estis la unua fojo por la diversnaciecaj popolanoj en Ŝinĝjang informiĝi pri la freŝdataj novaĵoj de Pekino. Vespere de la 20-a, pere de tiu satelito oni prove elsendis radioprogramojn de 15 lineoj kaj telesendis kolortelevidan programon en surteraj stacioj de Pekino, Ŝiĝjaĝuang, Nankino kaj aliaj lokoj.

NOVA IMPETO

De la ekflugo ĝis la lokiĝo de tiu komunika satelito daŭris nur ok tagoj. Okazis tiutempe pluraj ŝanĝoj de orbito, reĝustigo de pozicio, kiuj ĉiuj postulis tre komplikajn teknikojn.

Fakuloj sin okupantaj pri farado de tiu sinkrona satelito diris, ke ili ekipis ĝin per pli ol dek mil aparatoj produktitaj de nia lando. La

satelito moviĝas en rondira orbito je ĉirkaŭ 36 000 kilometroj for de la tero. Ĝi eltenas grandan atakforton. Kaj la sunenergia pilo, infraruĝa horizont-mezurilo kaj aliaj elektronaj aparatoj suferas fortajn ultraviolajn radiojn kaj drastan variaĵon de temperaturo. En tiuj kondiĉoj la satelito laboras normale. Analizite laŭ la eksperimento de televid-transsendo, la kvalito de la bildoj kaj voĉoj estas same bona kiel tiuj de la avangardaj komunikaj satelitoj de aliaj landoj. Tio montras, ke Ĉinio faris plian novan impeton en la spacteknologio.

SCIENCA ANTAŬVIDO

Por sendi la sateliton en la sinkronan orbiton 36 000 kilometrojn for de la tero, necesas ia nova altefika raket-motoro. Kuŝas en tio serio da solvendaj malfacilegaj teknikaj problemoj. Nuntempe en la mondo nur kelkaj landoj posedas tiun teknikon. Por antaŭenpuŝi kosmonaŭtikan teknologion al nova etapo, Ĉinio decidis fabriki sian propran novtipan raket-motoron.

La tasko falis sur la ŝultrojn de vicĉefprojektilo Ĝu Senjŭan. Li estas kuraĝa sciencisto. Li

Esplora ŝiparo en Pacifiko telekontrolas la lanĉitan eksperimentan sateliton.



ĉiam direktas sian atenton al tiuj plej novaj scienc-teknikaj kampoj, kiuj havas latentajn valorojn.

Apenaŭ la novtipa raketo sin montris en la mondo, en la komenco de la sesdekaj jaroj, li komencis esplori ĝin. Ĉar la fuzaĵo de tia raketo estas malfacile regebla kaj ekzistas granda danĝero en ĝia uzado, nemalmultaj opiniis tian raketon senperspektiva. Sed Ĝu Senjŭan pensis, ke kun evoluo de la sciencoj certe venos la tago, kiam ĝi okupos gravan lokon en la kosmonaŭtika afero. Li do kun grandega intereso kaj entuziasmo sekvis tiun novan raketon, kolektis kaj tradukis koncernajn materialojn, studis ĝian bazan teorion kaj esploris ĝiajn teknikajn problemojn.

Dank' al lia konkreta organizado kaj gvidado, dudekelkaj personoj komencis provfabriki motoron de nova raketo. La unua malfacilo, kiun ili renkontis, estis manko de ultramalalt-temperatura materialo por la motoro. Tiam nia lando ne havis tian materialon nek termometron por mezuri la ultramalaltan temperaturon en inĝenierado. Kion fari? Ĝu Senjŭan kaj liaj kolegoj faris la lastan ŝeton. Ili metis la likvan fuzaĵon en ujon, trempis la materialon en tiu likvaĵo kaj rapide ĝin eligis, antaŭ ol la fuzaĵo komplete volatilisi. Tiamaniere ili eksperimentis pri ĝia fizika kaj mekanika kvalito. Neimagebla danĝero minacis ilin, ĉar la aero plenis de volatilinta fuzaĵo kaj eĉ fajrero povus kaŭzi eksplodon kaj brulegon. Krome, se la trempita materialo refalus en la ujon pro senzorgo, ankaŭ la sekvo estus neimagebla. En tiaj cirkonstancoj ili laboris aplombe. Finfine ili sukcese faris la bezonatan ultramalalt-temperaturan materialon. Jen estis konkerita la unua fortikaĵo en fabrikado de la motoro de la novtipa raketo. Tio ne nur gajnis al ili tempon, sed ankaŭ akcelis la ultramalalt-temperaturan teknikon de nia lando.

La scienca malproksimvido de Ĝu Senjŭan kaj fervora laborado de li kaj liaj kamaradoj helpis ilin venki malfacilojn unu post alia kaj realigis ilian nebulan projekton — Ĉinio mem projektis raketon kaj faris ĝin el siaj propraj materialoj. Tiu triŝtupa raketo transportis al la kosmo la unuan ĉinan eksperimentan komunikan sateliton, kio montris, ke per sia tekniko de transporta raketo Ĉinio enviciĝis inter la avangardaj landoj.

PERSISTA LABORO KONDUKAS AL SUKCESO

Inter la farantoj de satelito vi povas aŭdi ilian devizon: “Persista laboro kondukas al sukceso!”

Mov-ekvilibrigilo estas grava aparato por ekzaktigi la pozon de la satelito en la orbito. Komence koncerna fako pretis fari mendon ĉe fremdlanda fabriko, tamen malsukcesis. Por rompi tiun teknikajn blokon nia fabriko de sciencaj aparatoj kuraĝe prenis sur sin la taskon. Sed ilin baris antaŭ ĉio la problemoj, ke la kvalito kaj malmoleco de la bezonata ŝtalo ne atingis difinitajn normojn. Por ŝpari tempon ili decidis fari eksperimenton en “rompiĝem-zono”, sen aldono de aliaj ekipaĵoj. “Rompiĝem-zono” estas specifa temperatura stadio en malhardado de ŝtalo. Tiumomente eta malatento facile kaŭzas disrompiĝon de la ŝtalo. Tamen rompiĝo kaj malmoliĝo ofte ligiĝas unu kun la alia. Post ripetfoja eksperimentado kaj esplorado ili fine sukcese prilaboris la bezonatan ŝtalon.

Por fari mov-ekvilibrigilon oni bezonas ankaŭ du tre glatajn flos-platojn. Sed la plato estis tro granda, kaj en nia lando tiam ne troviĝis taŭga platglatigilo por ĝin poluri. Du veteranaj laboristoj ekpoluris la platojn per siaj manoj. Post ilia polurado dum tuta vintro la du platoj fariĝis brilaj kiel spegulo.

Oficiale ekfunkciis la unua ĉina granda novtipa mov-ekvilibrigilo. Ĉiuj ĝiaj teknikaj normoj atingis la internacian avangardan nivelon. Ĝia ekarto estas maksimume du mikronoj, dum tiu de la avangardaj ekvilibrigiloj de aliaj landoj tri mikronoj. Kun nova elemento propra al nia lando ĝi povas fari iujn eksperimentojn neplenumebajn por aliaj landoj. Ankaŭ en teoria kampo de mov-ekvilibrigilo Ĉinio faris novan trovon.

“Persista laboro kondukas al sukceso!” Kun tiu konvinko ili faris la mov-ekvilibrigilon kaj grandan spac-imitaĵon, solvis la problemon de hermetikeco de la raketo, elfaris senbrosan motoron regatan ne per mekanismo. . . Kun tiu konvinko ili solvis ĉiujn malfacilojn kaj sukcese lanĉis la unuan eksperimentan komunikan sateliton de Ĉinio.

La satelito ankoraŭ ne povas alviciĝi al la internacia komunika satelita reto. Ĝi povas memstare plenumi transsendon en la de ĝi kovrita sfero. Sed jam alproksimiĝas la tago, kiam Ĉinio lanĉos pordisaŭdigan sateliton, kiu iros en la internacian komunikan satelitan reton. Sur vojo al la kosmo Ĉinio havas belan perspektivon.

EN la lastaj du jaroj ĉinaj ĵurnaloj kaj gazetoj informis pri fervora studo de sciencoj. La ĉinaj kamparanoj fervore lernas sciencajn sciojn kaj aktive aplikas avangardajn teknikojn en la agrikultura produktado. La fervoro rompas la malnovajn produktomanierojn, senĉese antaŭenigas la agrikulturan produktadon kaj multe ŝanĝas la kamparan fizionomion.

La kamparo de Hebej-provinco en norda Ĉinio estas tipo de tia scienco-fervoro. Tie oni energie popularigas sciencajn kaj teknikajn sciojn kaj tre multaj el la kamparanoj lernas kaj aplikas sciencajn sciojn. Sekve rapide disvolviĝas la produktado kaj riĉiĝas la kamparanoj. Por informi niajn legantojn pri tiu nova afero, antaŭ nelonge mi vizitis kamparon en la meza parto de la provinco.

SCIENCŬJ KAJ TEKNIKOJ NECESAJ POR KAMPARANOJ

Estas kompreneble, ke en terkulturado oni devas apliki sciencajn sciojn. Dum la pasintaj multaj jaroj la provinco donis grandan atenton al popularigo kaj aplikado de agrikulturaj sciencoj kaj teknikoj, la subprovincoj kaj gubernioj havis fakojn por esplori agrikulturajn sciencojn kaj teknikojn, la komunumoj staciojn de agrikulturaj sciencoj kaj la brigadoj agrikulturajn teknikistojn. Sed longtempe la kamparanoj ne tre atentis aplikon de agrikulturaj sciencoj kaj teknikoj pro tio, ke egalismo en la distribuo de agrikulturaj produktaĵoj vundis la laboran entuziasmon de la kamparanoj.

Post kiam la ŝtato reordigis la agrikulturan politikon en la pasintaj jaroj, precipe post efektivaigo de la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado, la familio fariĝis unuo de agrikultura



Kamparanoj aĉetas scienc-teknikajn librojn en vilaĝa foiro.

LI ĈJANG:

Fervora studo de sciencoj en la kamparo de Hebej

produktado kaj ekonomia kalkulo, kaj la agrikultura produktado rekte influas ĝian enspezon. Por disvolvi agrikulturan produktadon kaj diversspecan ekonomion, la kamparanoj deziras kiel eble plej rapide posedi sciencajn kaj teknikajn sciojn por terkulturo, trovi novajn produktajn vojojn kaj akiri pli da scioj por fari aliajn produktajn aktivadojn. Ĝuste en tia situacio aperis la fervora studo de sciencoj en la kamparo de Hebej-provinco. Tiel statas ankaŭ aliaj lokoj de Ĉinio.

POR KE LA KAMPARANOJ POSEDU SCIENCAJN KAJ TEKNIKAJN SCIOJN

Mi venis al la fama gren- kaj kotonprodukta gubernio Ĝengding, nordoriente de la provinca ĉefurbo Ŝiĝjaĝuang. La loko estas dense loĝata, t.e. kun pli ol 700 homoj en ĉiu kvadrata kilometro. Estro de la gubernia scienc-teknika komisiono diris al mi, ke multe da loĝantoj kaj malmulte da tero estas granda kontraŭdiro en tiu gubernio. Por solvi la problemon de superflua laborfortoj, la kamparanoj devas ne nur disvol-

vi produktadon de greno kaj koton, sed ankaŭ posedi pli da sciencaj kaj teknikaj scioj por fari aliajn ekonomiajn aktivadojn.

Por efektiviĝi ilian deziron, la gubernia scienc-teknika komisiono unue funkciigis diversajn vesperajn teknikajn lernejojn kaj teknikajn kursojn por kamparanoj en la gubernia urbo, subdistriktoj kaj vilaĝoj. Dank' al tio oni jam elkulturis pli ol 31 000 teknikistojn kaj ĉi tiuj, reveninte al siaj vilaĝoj, komencis aplikisian lernitaĵon en la produktado.

En malsamaj sezonoj la gubernia scienc-teknika komisiono invitis iujn hortikulturistojn kaj diversajn fakulojn fari prelegojn al kamparanoj. Pasintjare okazis pli ol 350 tiaj prelegoj en diversaj lokoj de la gubernio, kun partopreno de pli ol 80 000 homoj. Foje la komisiono invitis iun hortikulturiston de la Agromonia Instituto de Hebej-provinco prelegi pri kreskigo de legomoj sub plasta membrano. La prelego altiris al si tre multajn kamparanojn, ke ili plenigis ne nur la domon, sed eĉ la korton. Dum la prelegado subite furioziĝis vento, sed neniu forlasis la prelegejon. Tio forte emociis la preleganton. Lia kultur-metodo jam aplikis en multaj lokoj de la gubernio kaj bone efikis.

Scienc-teknika filmo estas plej figura rimedo por diskonigi sciencajn kaj teknikajn sciojn. Laŭ la bezono de la kamparanoj en malsamaj produktaj sezonoj, la komisiono projeksiis en vilaĝoj scienc-popularigajn filmojn por instrui al la kamparanoj kiel kreskigi kotonujojn, selekti semojn, uzi sterkon, ŝpruci insekticidon kaj kovri kampojn per plasta membrano.

La estro diris al mi, ke ili ankaŭ ofte okazigas agrikulturajn

scienc-popularigajn ekspoziciojn, presas kaj disdonas diversajn scienc-teknikajn materialojn, helpas kamparanojn havigi al si taŭgajn scienc-popularigajn librojn, sendas profesiajn teknikistojn aranĝi konsultadon por kamparanoj kaj abonigas al ili ĵurnalojn kaj gazetojn. Ĉio tio estas bonevena al la vasta kamparanaro. La kamparanoj, daŭrigis la estro, soifas novajn teknikojn kaj eĉ elspezas multe da mono por akiri ilin. La kleraj kamparanoj diligente lernas sciojn el libroj. Ankaŭ tio markas grandan ŝanĝiĝon en la kamparo de Hebej-provinco.

MODELAJ FAMILIOJ

Dank' al la subteno de la scienc-teknikaj gvid-organoj de diversaj gubernioj, aperis en la pasintaj jaroj en la kamparo de Hebej-provinco multaj familioj, kiuj bone lernas kaj aplikis sciencajn sciojn. Oni nomas ilin modelaj familioj pri sciencoj kaj teknikoj. Senĉese kreskis la nombro de tiaj modelaj familioj, ekzemple la provinco havis nur 230 000 modelajn familiojn en 1982 kaj post unu jaro la nombro kreskis ĝis 530 000, kiuj konsistigis 4.3% de la kamparanaj familioj de la provinco. La nombro daŭre multiĝas en tiu ĉi jaro. En la kamparo de la provinco mi vizitis tri modelajn familiojn, kiuj profunde impresis min.

En la vilaĝo Ŝiĝuang de Manĉeng-gubernio mi intervjuis modelan kamparaninon Ĵan Juhua, kiu riĉiĝis dank' al terkulturo per scienca metodo. Kiam mi venis al la hejmo de tiu mezaĝa virino, mi vidis kelkajn ĉarpentistojn labori en ŝia korto. Ili estis konstruantaj novan loĝdomon por ŝia familio. Parolante pri tio, ŝi ne povis kvietigi sian ekscitiĝon. Antaŭ tri jaroj ŝia familio estis

malriĉa en la vilaĝo kaj devis ŝpari ĉiun groŝon por manĝaĵo kaj vesto, por ne paroli pri konstruado de nova domo.

Dum la lastaj tri jaroj ŝia familio laŭkontrakte kulturis kolektivajn agrojn. Ili diligente laboris, aplikante sciencajn metodojn en terkulturado, tiel ke ili enspezis pli kaj pli multe kun ĉiu jaro kaj fariĝis modela familio fama tra la gubernio. Je mencio de terkulturo per scienca metodo ŝi ekparolis torente: "Kvankam mi havas malaltan klerecon, tamen mi konscias, ke kamparanoj devas posedi sciencajn sciojn pri terkulturado." Ŝi prezentis al mi "Kokobredaj Metodoj", "Abelbredado" kaj aliajn scienc-teknikajn librojn pri kulturo de greno kaj kotonujoj kaj koncernajn ĵurnalojn. "Guste tiuj libroj kaj ĵurnaloj," ŝi daŭrigis, "ebligis al mi aplikis novajn teknikojn al selektado de semoj, uzado de sterko kaj scienca kulturado kaj prizorgado."

Sian bonan rikolton de greno kaj koton Ĵan Juhua ŝuldis al apliko de agrikulturaj sciencoj kaj teknikoj. En 1983 ŝia familio enspezis pli ol 8 000 ĵuanojn (ĉ. 4 000 usonajn dolarojn), kiuj jam superis ĝian totalan enspezon en la pasintaj dek jaroj.

DIVERSSPECA EKONOMIO

En la vilaĝo Nandjantou de Tangŝjan-gubernio mi vizitis la modelan familion de Li Ĝinglong konata kiel "reĝo" de fungoj". En 1981 li komencis kulturis fungojn. Pro manko de fakaj scioj li malsukcesis en la unua jaro. Sed li ne perdis la kuraĝon. Li konsultis scienc-teknikajn librojn kaj samtempe faris eksperimenton. En la dua jaro li prove kulturis en sia korto fungojn de 150 kvadrataj metroj. Li okupiĝis

pri inokulado, akvoŝprucado kaj prizorgado, tute observante ĉiujn regulojn priskribitajn en scienc-teknikaj libroj, kaj fine li sukcesis. Tiujare li rikoltis 2 050 kilogramojn da fungoj kaj kontraŭ ili ricevis 1 200 jŭanojn.

En 1983 Li Ĝinglong komencis uzi plurtavolan spacon por kulturi fungojn. En tiu jaro li rikoltis kaj vendis pli ol 10 000 kilogramojn da fungoj, vendis ankaŭ aliajn agrikulturajn kaj kromokupajn produktaĵojn kaj enspezis sume pli ol 20 000 jŭanojn, kaj tiel li modeligis sian familion. Sub lia gvido kaj helpo pli ol 2 000 familioj en la gubernio okupiĝis pri kulturo de fungoj. Nemalmultaj el ili sekvis lian metodon.

La tria modelo, kiun mi vidis, estis la kokobredejo Dongsanĝjau posedata de Ŝing Fengĉun en antaŭurbo de Ŝiĝjaĝŭang. Montran-

te vicon da ruĝbrikaj domoj, Ŝing diris al mi: "Jen kokaj staloj de 550 kvadrataj metroj konstruitaj pasintjare." En lia akompano mi iris en kokan stalon kaj vidis knabinon nutri kokojn. Li konigis al mi, ke ŝi estas lia dua filino. "La kokoj ĉi tie bredataj estas bonrasaj, enkondukitaj el eksterlande," daŭrigis li, "kvankam ili estas malgrandaj kaj malmulte manĝas, tamen ili demetas multe da ovoj." Mi demandis lin, kiom da ovoj li ricevas ĉiutage. Li diris, ke li bredas en du grandaj kokaj staloj 2 200 kokinojn, kiuj demetas pli ol 1 600 ovojn ĉiutage.

Ŝing akompanis min por rigardi keston por elektra kovado, kiun lia plej aĝa filo faris. En la kesto estis vicoj da kokovoj varmigataj de elektraj lampoj. Apud la kesto kuŝis unu sur alia malaltaj lignaj

kestetoj por unutagaj kokidoj. Dum malpli ol duonjaro eloviĝis jam pli ol 36 000 kokidoj. La bredejo mem bredas 21 000 kokojn en kaĝoj kaj vendis la aliajn. Vidante tiujn kokojn, Ŝing diris al mi: "Antaŭe mi bredis dekkelkajn kokojn sen scienca metodo kaj ricevis nur kelkajn ovojn. Sed nun la afero estas tute alia. Por bredi kokojn en granda nombro, oni ne devas neglekti sciencon." En la lastaj du jaroj la mastro ellernis serion da sciencaj metodoj por elekti bonrasajn kokojn, prepari nutraĵon, reguligi temperaturon kaj aerumi la domojn, moderigi la lumon, preventi epidemiojn, kovi ovojn kaj bredi kokidojn. Ĉe la adiaŭo li diris al mi, ke baldaŭ li aplikos avangardan teknikon de kaĝa bredo. Tiam li povos bredi pli da kokinoj kaj fari pli da kontribuo al la ŝtato.

La kok-bredejo de Ŝing Fengĉun





La norda ekspluatejo de la Junfu-a Sulfofera Minejo

ĈJI SIŬ:

La plej granda kemia minejo de Ĉinio en konstruado

ANTAŬ nelonge mi vizitis la plej grandan konstruitan kemia minejon de Ĉinio — la Junfu-an Sulfoferan Minejon, kiun mi atingis post 70-kilometra veturado okcidenten de la Sep-stelaj Rokoj de la urbo Ĝaŭĉing, Gŭangdong-provinco, la fama turisma loko en la suda Ĉinio.

La minejo estas unu el la gravaj konstruoj en Ĉinio. En 1965 oni komencis ĝin ekspluati et-skale per homaj fortoj, sed en 1977 grandskale per maŝinoj. La minejo estas la dua minejo en la mondo. La ercoj entenas mez-nombre 33% da sulfofero kaj okupas la unuan lokon de la mondo tiuflanke. La minejo havas tre favorajn ekspluatajn kondiĉojn: la minaĵoj kun nur malmulte da malutilaj miksaĵoj; la ercoj rezervitaj ĉe la montotalio super la marnivelo; la situo proksima al la urbo kaj kajo.


Ĉio ĉi faciligas la akvan ellasadon, ekspluatadon kaj transportadon.

La minejo konsistas el la suda kaj norda ekspluatejoj. La norda kun riĉaj ercoj estas facile ekspluatebla. Tuj sub la malprofundaj tersurfaco kaj fersablo sin kaŝas la orbrila ercotavolo kun dikeco de 170 metroj maksimume. Tie estas malmulte da roktavoloj. Post elfosado kaj dispecigo oni povas ercojn transporti al fabrikoj.

Laŭ la spirala montvojo larĝa je 11 metroj mi supreniris kaj atingis la nordan ekspluatejon. Pro longtempa ekspluatado ĝia montosupro jam malleviĝis je 100 metroj kaj formiĝis tie arakidŝelforma artefarita baseno 1.8 kilometrojn longa kaj 0.8 kilometron larĝa kun bonordaj ŝtuparoj. De la norda kaj suda ekspluatejoj oni jam forportis

18 000 000 kubmetrojn da tero kaj ŝtono kaj per tio plenigis kelkajn valojn. Por tion fari per homa forto estus bezonataj 10 000 laboruloj por ses jaroj. Fakte, nun laboras nur kelkaj homoj kaj grandtipaj modernaj maŝinoj. La dentrada drilo kun skafaldo 24 metrojn alta profunde boras, kaj poste oni faras min-eksplopadon kaj tiel malkompaktigas unufoje kelkdek milojn da kubmetroj da tero kaj ŝtono. Gigantaj buldozoj formovas malgrandajn dunojn da tero kaj faras ebenan taluson malantaŭ si. La memŝarĝa kamiono kun ŝarĝkapablo de 27 tunoj, kvazaŭ du-etaĝa domo, brue kuris preter mi.

Inĝeniero de la minejo diris al mi, ke sulfofero estas materialo por produkti sulfatan acidon nomatan “patrino de industrio”. La ŝtato metas grandan atenton



Nova minista urbo

sur la ekspluatadon de la Junfu-a Sulfofera Minejo, kaj investis pli ol 500 milionojn da jŭanoj (egale al ĉ. 250 milionoj da usonaj dolaroj) por konstrui ĝin en bazon de sulfofera minaĵo ĉiujare produktantan tri milionojn da tunoj da ercoj. Laŭ la plano ĝi estos finkonstruita en 1985. Tiam ĝi povos liveri al la ŝtato 2.4 milionojn da tunoj da norma sulfofera minaĵo, per kiu oni povos produkti 2.4 milionojn da tunoj da sulfata acido kaj 4.8 milionojn da tunoj da fosfora sterko. Tio multe mildigos la streĉitecon en la livero de sulfata acido kaj fosfora sterko de Ĉinio.

En la lastaj jaroj, kelkdek laborejoj estis samtempe ekkonstruitaj en la minejo kun periferio de 40 kilometroj. Nun estas fundamente konstruitaj pli ol 20 konstruoj, inkluzive de ercoselekto, dispecigejo de riĉaj ercoj. Kaj cetere, oni finkonstruis unu post alia ankaŭ la specialan fervojon je 16 kilometroj longan inter la minejo kaj la kajo, kvar ankrejojn de la kajo, grandan kranakvan stacion, 110 000-vol-

tan alttensian linion je 106 kilometroj longan, 12 parojn da ondoportanta komunikada kanalo, transformatoran stacion k. a.

Precipe menciinde estas, ke la medioprotekto estas atentata kaj farata samtempe kun la konstruado de la minejo. Por protekti la medion oni faras multajn klopodojn por trakti la eluzitajn akvon, gason kaj oleon. La akvo ellasita el la minejo entenas multajn acidajn materialojn malutilajn al homoj kaj bestoj. Pro tio, ĉirkaŭ la minejo oni konstruis kvar reguligajn instalaĵojn de acid-akvo kaj plurajn kanalojn por purigi la eluzitan akvon. Tio fundamente malebligas al la eluzita akvo enfluadon en ekspluatadojn kaj tersurfacon de la ercejo. En la minejo fondiĝis medioprotekta trupo kun pli ol 30 inĝenieroj kaj teknikistoj kaj observa veturilo, memŝarĝa ŝarĝaŭto k. a. Tie konstruiĝis kondukokanalo kaj cisterno k. a. por regi kotŝtonan fluon kaj perdon de akvo kaj tero.

Rigardante suben de sur la montosupro mi vidis belan urbon

brakumitan de la verdaj montoj. Antaŭ kvar jaroj tie estis malriĉa montvilaĝo, sed nun sin prezentas verdaj kampoj kaj modernaj konstruaĵoj. Kelkaj etaĝdomoj staras sur la monto. Ili estas element-lernejo, mez-lernejo kaj teknika lernejo de oficistoj kaj laboristoj, kie lernas pli ol mil lernantoj. La ministoj loĝas en etaĝdomoj ĉe la montpiedo. Tie kuŝas ankaŭ bela hospitalo kaj administracia domo de modesta stilo. Dum kvar jaroj la minejo faris konstruojn kun plankareo de pli ol 240 000 kvadrataj metroj, el kiuj 70 000 kvadrataj metroj estas jam disponeblaj.

Oni promenas tie kvazaŭ en parko. Ĉie parfumas floroj kaj kantas birdoj. Eĉ en la ekspluatadoj kaj konstruejoj vidiĝas verdaj gazonoj. La minejo havas pli ol 40 laboristojn, kiuj speciale zorgas pri la arbarkulturo. Ĉiuprintempe la oficistoj kaj ministoj volonte plantas arbojn. En la lastaj tri jaroj ili plantis sume 130 000 arbojn kaj konstruis kvietan parkon kaj belajn artefaritajn monteton kaj fontanon.

HŬANG ĈŬANTI:

Turpan

—Smeraldo sub la Flamanta Monto

ESTIS sezono de maturiĝo de vinberoj kaj melonoj. Mi alvenis al la gubernio Turpan de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, la plej nordokcidenta landparto de Ĉinio. Vespere de la tago, kiam mi atingis ĝin, mi havis la feliĉon rigardi sub vinbera latlatiso prezentadon riĉan je naciaj kaj lokaj gustoj. Min forte impresis ujgura kanto «La Bela Turpan».

Vinbero de Turpan ĝuas vastan diskonatecon en Ĉinio. Historiaj libroj notis, ke vinbero estis enkondukita en Ĉinion de Ĝang Ĉjan, sendito de Handinastio (206 a. K. — 220 p. K.) al la Okcidenta Regiono. Jam antaŭ pli ol 1 500 jaroj Turpan famiĝis pro la kulturado de vinberoj.


Turpan estas la plej malalta baseno de Ĉinio, kaj la akva surfaco de Ajding-lago en ĝia fundo estas malpli alta ol la marnivelo je 154 metroj. La plej alta temperaturo de la baseno ĉirkaŭita de montoj povas atingi 49.6° C. Ĝia senprujna periodo superas 220 tagojn, kaj la jara sunluma periodo longas 3 000 horojn. La alta temperaturo tre favoras al kreskado de vinberoj kaj melonoj.

Maturiĝis la vinberoj de Turpan, kaj mi ebriiĝis de la kolorbunteco, aromo kaj dolĉeco de la vinberoj. Mi direktis mian rigardon al la foraĵoj kaj vidis belvestitajn ujgurajn knabinojn, kiuj ĝoje plukis vinberojn. Ilian laboron akompanis gaja kantado kaj ridado, kaj la latlatisoj estis

peze ŝarĝitaj de smeraldaj kaj agataj vinberoj olivograndaj aŭ perlograndaj, en formoj de pilko, koro, ĉevalina mampinto k. a. Kiel salivigaj ili estas!

Ĝis la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la vinberkampoj kovris nur 1 200 hektarojn kaj la jara produktokvanto ne superis 4 000 tunojn. Nun la vinberkampoj okupas 6 000 hektarojn kaj la jara transportita kvanto atingis 40 000 tunojn. La plej preferata el la vinberspecioj en Turpan estas blanka senkerna vinbero, kiu portas helflavan haŭton kaj diafanan karnon. Tial la vinbero estas nomata ankaŭ “perla vinbero”. Oni diris al mi, ke tia vinbero entenas 20 procentojn da sukero kaj estis honorita internacie “verda perlo

Sekigo de senkernaj vinberoj



el Ĉinio". Pro ĝia alta enteno de sukero kaj ĝia senkerneco oni faras tiuspeciajn vinberojn sekaj. En septembro oni pendigas la plukitajn blankajn senkernajn vinberojn en malvarmetaj ŝedoj por ke ili nature sekiĝu. Post ĉ. 40 tagoj pretiĝis fame konataj sekvinberoj. La sekvinberoj portas originan koloron, havas decan akvoentenon, apartan aromon kaj estas longe konserveblaj.

U Mingĝu, vickomisaro de Turpan-subregiono, diris al mi, ke disvolvo de vinbera produktado estas neanstataŭigebla ekonomia supereco de Turpan. En 1956 U Mingĝu diplomitiĝis en ĝardenistika fakultato de agromomia instituto kaj de tiam ŝi laboris 28 jarojn en Turpan. Ŝi aspiris kulturi pli bonajn speciojn de vinbero kaj melono. Post longa klopodado ŝi elkulturis bonan specion de melono "Hongŝincuj", dolĉegan, fragilan, produktivan kaj longe konserveblan. Nun la specio estas disvastigita en Ŝinĝjang. En la lastaj kelkaj jaroj ŝi elkulturis du speciojn de akvomelono. Unu el ili

estas frumatura kaj la alia — produktiva. Kampanoj de la loko nomis ŝin "komisaro pri melono".

Krom vinbero kaj melono, ankaŭ la Flamanta Monto de Trupan multe allogas turistojn. La monto estis detale priskribita en la ĉina klasika romano «Pilgrimado al la Okcidento». La romano rakontis, kiel klopodis la eminenta bonzo Ŝjüanzang por transgrimpi la Flamantan Monton dum sia longa pilgrimado al la Okcidento. Poste la rakonto estis adaptita al dramo kaj multe ludata en teatro, pro tio la monto fariĝis pli vaste konata en Ĉinio.

Forlasinte la gubernian urbeton de Turpan, nia aŭto eniris en Gobion, kaj mi tuj sentis varman fluon. Maldekstre de la aŭto estis monto kuŝanta en latitudlinia direkto. La monto el ruĝbrunaj sabloŝtonoj longas 100 kilometrojn, larĝas 10 kilometrojn kaj altas 500 metrojn. La belaj sabloŝtonoj kun sulkoj en formo de flamo, bakataj de la arda suno, havas la temperaturon de pli ol 70 gradoj Tiam miaj vida-

do kaj tuŝado kunligiĝis kun flamo, kion helpis mia imago, kaj tial la monto vere "ekflamiĝis" antaŭ miaj okuloj. Ripozinte kelkan tempon ĉe la buŝo de la kanjono, ni komencis trairi ĝin. Oni diris, ke la kanjono ja estis norda vojo de la "Silka Vojo".

Irinte nelongan vojon, mi vidis fluon kaj ruĝajn salikojn, kaj pli antaŭe estis densaj fragmitaroj kiuj sin etendis jam ĝis la vojrandoj. Mi neniam atendis, ke en la "Flamanta Monto" kreskas verdaj fragmitoj. Elirinte el la kanjono, mi vidis tute malsaman pejzaĝon. Antaŭ mi etendiĝis verda kamparo de kotonoj, maizoj kaj helianto.


La supro de la monto estas tute kalva kaj sen viva, sed la valoj estas plenaj de verdaĵoj kaj aromaj vinberoj kaj melonoj. La klimato de Turpan estas tre seka, kaj la jara pluvokvanto estas nur dekelkaj milimetroj, sed la subtera akvo estas tre abunda. La montoj, altaj je 4 000 metroj super la marnivelo, ĉirkaŭantaj la basenon ĉiam portas neĝan ĉapon. En printempo

Kontraŭsabila forsto de la Vinbera Komunumo en Turpan-baseno



Subtera kanaletoj





Melonoj transportotaj aliloken

kaj somero degelinta firno pene-triĝas en la gruzan grundon antaŭ la montoj kaj formas grandegan subteran akvokonservejon. La popolo de la loko kreis laŭ la kondiĉoj neordinaran subteran puton.


Survoje al la Vinbera Valo mi vidis rondajn sablajn amasojn vicigantajn en rekta linio, kiu sin etendas al la foraj montoj. Pli proksimiĝinte, mi vidis pli klare, ke la sablaj amasoj estas aperturoj de putoj, tute similaj al la ordinaraj putoj, sed iliaj fundoj estas interligitaj per kanaletoj. La akvo en la kanaletoj fluas de la randoj de la baseno al la centro. La subteraj kanaletoj bone protektas la akvon de vaporigado kaj kovro far sablo. En Turpan fluas pli ol 1 100 subteraj kanaletoj kun longeco de kelke ĝis dekoj da kilometroj, kaj ilia totala longeco estas ĉirkaŭ 4 000 kilometroj, pli longa ol la Gran-

da Kanalo inter Pekino kaj Hangĝoŭ.

Mi iris laŭ la linio kaj fine atingis la elfluejon de la kanaletoj. La klara akvo de sur la neĝaj montoj multe ĝojigis min. Mi ĉerpis per miaj manoj akvon el ĝi, trinkis ĝin kaj lavis la vizaĝon.

Hodiaŭ la antikvaj subteraj kanaletoj daŭre ludas sian rolon kaj la nove fositaj grandaj kanaletoj pli multe bonigis la tiean irigaciadon. La totala areo de la agroj en la baseno Turpan plivastigis de 20 000 hektaroj antaŭ la Liberiĝo ĝis la nunaj 53 000 hektaroj. Cetere oni arbarizis 3 000 hektarojn da tero. Nun la forstozonoj longas pli ol 2 500 kilometrojn. Ili protektas la kampojn mildigante ventegon kaj haltigante movsablon.

Nun kiel smeraldo, Turpan brilas en Gobio.



**NOVA
INTERNACIA
REVUO
POR
DISTRO
KAJ
AMUZO**

**OVO-
-ENHAVO:**

bildstrioj, humuraĵoj,
sciencfikcio, (ne)kutimaj
intervjuoj, internacia helpo,
favoraj viaĝeblecoj, konkursoj,
ĝercoj kaj satiroj pri la E-movado,
distraj interesaj, detektivaj romanoj,
naturfenomenoj kaj . . . pluraj surprizoj.

OVO--legaĵoj estas ĉiam aktualaj kaj konvenaj por ĉiu aĝo kaj ĉiu lingvokona nivelo de Esperanto. OVO ĉiĉpe konvenas al KOMENCANTOJ.

OVO aperos ĈIUN 3-an SEMAJNON ekde septembro 1984. JARABONO estas 35 nederlandaj guldenoj (aŭ egalvaloro). RABATO: pagantoj ĝis la fino de aŭgusto 1984 pagas nur 29 nederlandajn guldenojn.

Je 10 abonoj unu senpaga!

Viajn OVO-numerojn vi povas mendi kaj aboni ĉe INTERNACIA KULTURA SERVO, 41000 Zagreb, Amruŝeva 5/1, Jugoslavio.

Bonvolu peti provnumeron!

ZM

Lernometodo de Esperanto kreita de zagrebaĵ esperantistoj ba ziaĝis je logika strukturo de Esperanto mem, kaj je la rezultoj de vortofteca esplorado de parolanta Esperanto. La antaŭaj eldonoj de la lernolibro laŭ la ZM jam estas adaptitaj al 15 lingvoj. Kromaj helpo-kaj ekzercmaterialoj, akopanantaj la lernolibron, ebligas tre sukcesan memlernadon, aparte en grupoj kaj kursoj sen tradicia preleg-prezenta funkcio de instruisto. La metodo anikeblas ankaŭ por rapidaj, t.n. seminafinaj kursoj nova (6-a) eldono de la lernolibro ebligas ankaŭ la lernolibron AĴN KURSOJN, kun partoprenantoj el diverslingvaj landoj, ĉar ĝi estas eldonita en tute identa formo, en la GERMANA, ITALA, HUNGARA, KROATSERBA, FRANCA kaj ANGLA lingvoj.

la zagreba metodo

- 1 — LERNOLIBRO ... 50 gld
- 2 — K4SETO kun tekstoj kaj kanto, e la lernolibro ... 10 gld
- 3 — „KI ESTAS JOZEFO?“ ekzercobildstrio 3 gld
- 4 — LA SENTIMULO - romano en facilta Esperanto 9 gld
- 5 — Instrukcioj por instruistoj 1,5 gld

Kompleto por la baza (A) kurso de Esperanto laŭ la ZM konsistas el:

Rabatoj:
— La kompleto + 1-jara abono al „OVO“ ... 50 gld.
— Por mendoj de minimume 25 lernolibroj kaj 25 bildstrioj oni ricevas senpage 1 kompletan + „OVO“ jarabonon
— Por minimuma mendo de 10 ekzempleroj de lernolibro aŭ bildstrio aŭ „La Sentimulo“ oni ricevas 50% rabaton.

Mendoj ĉe: Internacia Kultura Servo, YU-41000 Zagreb, Amruŝeva 5/1

(041) 424 660

Esplora kaj trejna centro de metano

MULTAJ prudentaj personoj esploras novajn energiojn pro tio, ke la hodiaŭa mondo alfrontas elĉerpiĝon de minerala energio. En tia situacio la esploro kaj ekspluato de metano, la kreskaĵa energio, estis vaste faritaj kaj vekis atenton de pli kaj pli multaj homoj.

Metano, bruligebla gaso, naskiĝas post hermetika mikroba fermentado de homa kaj bruta fekaĵoj, vegetalaj tigoj kaj folioj kaj aliaj organikajoj.


Frue en la 11-a jarcento a. K. iu ĉina antikva libro diris, ke “supre estas fajro kaj malsupre marĉo” kaj “en marĉo estas fajro”. Tio estis la plej fruaj notoj de Ĉinio pri metano. Sed nur en la okdekaj jaroj de la 19-a jarcento Ĉinio komencis eksperimenton pri metanoproduktado. Ĉ. 1920 s-ro Ljao Gjoĵuj projektis la unuan ĉinan perfektan metanan basenon. La plej frue konstruita metana baseno en Ĉinio estas en Daming-gubernio, Hebej-provinco. Ĝi havas historion de 46 jaroj kaj hodiaŭ ankoraŭ produktas metanon.

Siĉuan-provinco de Ĉinio donis ekzemplon por disvastigi utiligon de metano. En la fino de la kvindekaj kaj sepdekaj jaroj en tiu provinco prosperis utiligo de metano. En 1979 oni difinis tiun provincon kiel metan-esploran centron de la lando. En 1981 la Disvolva Programo de UN faris interkonsenton kun la ĉina registaro, ke la provinco estu la Biogas-esplora kaj Trejna Centro de Azi-Pacifika Regiono.

La centro situas en la suda antaŭurbo de Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉuan-provinco. Ĝi havas U-forman blankan domegon kun totala areo de pli ol 6 300 kvadrataj metroj. La lernoĉambro por fremdlandaj kursanoj estas en la dua etaĝo. Apud ĝi troviĝas eduka ĉambro de elektraĵaŭdo-vidaj



La Esplora kaj Trejna Centro de Metano



En laboratorio

instrumentoj kun lumbildoj, filmoj kaj televidaj bildbendoj. Granda parto de la domo estas destinita por laboratorioj kun kompletaj instalaĵoj. La fundamentaj donitaĵoj en metana esploro povas esti akiritaj en tiu domo.

La centro havas pli ol 120 instruistojn, sciencajn laborantojn kaj administrantojn. Kiam la domo ankoraŭ ne estis finkonstruita, ĝi jam dufoje akceptis 28 kursanojn el Bangladeŝo, Srilanko, Birmo, Nepalo, Tajlando, Sudano, FR Germanio, Indonezio, Filipinoj kaj Lesoto. La instruistoj laŭ instrua programo prelegis al ili pri konstruado de ĉinstila metana baseno, fermentado kaj administra metodo. La kurso daŭras 30-40 tagojn. Post tio la kultura centro donas al la fremdlandaj kursanoj diplomojn. Antaŭ la finiĝo de la kurso okazinta en 1983, sinjoro Kanaan, membro de la reprezen-



*Eksterlandanoj en
konstrua praktikado*

tantaro de la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo de UN en Ĉinio veturis de Pekino al Ĉengdu speciale por koni la metanan kurson. Li kunsidis kun fremdlandaj kursanoj kaj oficistoj kaj ĝojis pri la sukcesa organizado de la kurso kaj efika instruado.

La instrua metodo, ke teorio kombiniĝas kun praktiko, estas rimarkinda karakterizaĵo de la trejna centro. En la kurso la instruistoj prelegas ĉefe pri konstruado kaj administrado de ĉinstila metana baseno. Oni donas lecionojn pri projektado kaj konstruado de metana baseno por ĉina kampara familio, meĥanismo kaj teknologio pri metana fermentado, utiligo de eluzita fermentaĵo, utiligo de metano kiel movforto, manipulado de metana brulilo, ekipaĵo por elbasenigi eluzitan fermentaĵon ktp. La fremdlandaj kursanoj ne nur studis la teorion, sed ankaŭ partoprenis en praktiko. En 1985 11 fremdlandaj kursanoj konstruis 2 metanajn basenojn en praktika manipulado kaj ĉi tiuj jam produktis metanon antaŭ ilia diplomitiĝo. La instruistoj loĝis en la sama domo kun la fremdlandaj kursanoj por ĝustatempe solvi iliajn demandojn. Ankaŭ la kursanoj estis kontentaj pri la laboro de siaj ĉinaj instruistoj. Iu birma kursano diris: "La scioj kaj teknikoj instruitaj de la instruistoj estos aplikataj en multaj landoj."

La instruistoj kaj la kursanoj estas bonaj amikoj. Je la naskiĝtago de iu germana kursano liaj instruistoj kaj kunlernantoj aranĝis kunmanĝadon kaj mendis grandan naskiĝtagan kukon kun ĉina ideografiaĵo "Longviveco". Li ĝoje diris: "Estas por mi neforgesebla mia naskiĝtago festita en Ĉinio."

Dum la studado en la trejna centro la fremdlandaj kursanoj ankaŭ rigardis multajn metanajn

basenojn en la kamparo. En la granda Siĉŭan-provinco la kamparanoj ĝenerale uzas metanon. Multaj familioj konstruis metanan basenon por servigi metanon por lumigado, hejtado, kuirado de furaĝo ktp. En iuj vilaĝoj oni ankaŭ kunligis kelkajn metanajn basenojn por produkti elektron, per kiu oni pumpas akvon. La eluzita fermentaĵo estas bona organika sterko, kiu povas preventi disvastigon de malsanoj pro tio, ke la fermentado mortigis la ovojn de la parazitoj. La kursanoj vizitis metanan basenon de iu alkoholaĵ-farejo. Tiu 2 000-kubmetra baseno utiligis eluzitan likvon de la farejo por produkti metanon. Antaŭe la eluzita likvo fluis en kanalon, kaŭzante polucion al la medio. Post kiam la farejo konstruis la metanan basenon en 1976, ĝi ne nur multe reduktis polucion, sed ankaŭ ŝparis multe da hejtaĵo. Ĝia kaldronejo sola povas ŝpari ĉiutage du tunojn da karbo. Ĝia metanelektrejo kun du 120-kilovattaj generatoroj ĉiutage ŝparas 300 kilogramojn da dizeloleo. Ĝiaj laborista manĝejo kaj fermentejo uzas metanon kiel hejtaĵon. Post sia vizito al ili la plenuma prezidanto de la Usona Bioenergia Komisiono laŭdis: "Tio estas monda kreaĵo." Ankaŭ la kursanoj opiniis, ke metano havas vastan perspektivon de disvolviĝo.

Kvankam la lernotempo estis mallonga, tamen jam stariĝis profunda amikeco inter la fremdlandaj kursanoj kaj iliaj ĉinaj instruistoj. Reveninte al sia patrolando, multaj kursanoj ofte skribis al la instruistoj pri siaj sukcesoj aŭ malfaciloj en konstruado de ĉinstila metana baseno. Iu bangladeŝa kursano diris en sia letero: "La metana baseno farita de mi jam produktas metanon, sed ne povas lumigi lampon." Li deziris aĉeti ĉinan metanan lampon kaj koni, kiel bone hermetikigi ĉinstilan metanan basenon. La instruistoj letere solvis la demandojn de la kursanoj.

POST seshora aŭtoveturado okcidenten de Uhan, la ĉefurbo de Hubej-provinco, tra la pitoreska Ĝjanghan-ebenaĵo, oni povas atingi la historie konatan urbon Ĝjangling.

Ĝjangling antikve nomiĝis Ĝingĝou. Ĝi situas inter Ĝingŝan-monto en la nordo kaj Jangzi-rivero en la sudo, de tie oni povas atingi Siĉŭan-provincon en la okcidento kaj ŝipveturi al la provincoj Ĝjangsu kaj Ĝeĝang en la oriento. Tial ĝi okupis gravan strategian pozicion. Kaj krome, la ebena kaj fekunda Ĝjangling kun multaj riveroj kaj lagoj tiam jam estis abunda produktaĵo de fiŝoj kaj rizo. Tial frue en 689 a. K., la reĝo Ŭen de Ĉu-regno prenis ĝin kiel sian ĉefurbon.

La ĉefurbo de Ĉu-regno situas kvin kilometrojn norde de la nuna Ĝjangling kaj sude de Ĝjiŝan-monto. Tial ĝi portis la nomon Ĝjinar. Dum 411 jaroj de la komenco ĝis 278 a. K., kiam ĝi estis konkerita de Ĉin-regno, 20 reĝoj de Ĉu-regno prenis Ĝjinar kiel sian ĉefurbon. Meze de la 7-a jc. a. K. la reĝo Ĉeng de Ĉu-regno konstruigis la imponan palacon Ĝu ĉe la bordo de la rivero kvin kilometrojn sude de Ĝjinar-urbo kaj poste kajon por la regnaj ŝipoj. Dank' al longtempa plivastigado kaj bona entreprenado Ĝjinar rapide disvolviĝis en la plej prosperan ĉefurbon ĉe la baseno de Jangzi-rivero en la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770—221 a. K.)

En la atakado far Ĉin-regno forbrulis la urbo. Post kelkdek jaroj la pasinta palaco Ĝu disvolviĝis en urbon kaj ricevis la nomon Ĝjangling. Ekde tiam diversaj dinastioj instalas tie urban administron. Kaj en Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.) ĝi

Ĝjangling—la kultura lulilo de Ĉu-regno

de ĈANG ŜJŬE

fariĝis unu el la dek grandaj komercaj urboj de la lando.

La majesta kaj impona antikva urbo Ĝjangling estas por turistoj okulfrapa. Kvazaŭ naĝanta drako ĝi kuŝas inter lagoj kaj montoj. Laŭdire, la ĉirkaŭmuro de la urbo estis konstruita en la tria jarcento kaj riparita kaj plilongigita de postaj dinastioj. Kaj la nuna urbomuro estis imite rekonstruita en Ĉing-dinastio en 1646 sur la malnova bazo. La urbomuro longas 9.3 kilometrojn kaj altas 8.83 metrojn. La urbo estas ĉirkaŭata de rivero kun verdaj plorsalikoj, cipresoj kaj pinoj ambaŭborde. Ĉie ĉe la urbo dislokiĝas lagoj kiel belaj perloj.

Ĉirkaŭ la antikva urbo estas multaj historiaj vizitindejoj. Inter ili estas tri famaj temploj. En la okcidenta parto de la urbo staras la templo Kajjŭan, konstruita en la erao Kajjŭan (713—741 p. K.) de Tang-dinastio, tial ĝi ricevis la nomon. Nun ĝi servas kiel la Ĝingĝou-a Muzeo. En ĝi konserviĝas loke elterigitaj antikvaj objektoj, el kiuj troviĝas pli ol cent objektoj protektataj de la ŝtato. En la norda parto de la urbo staras la templo

Jŭanmjaŭ, konstruita ankaŭ en la sama erao kaj konsistanta el ses haloj. Kaj la nunaj Juhŭang-halo kaj Posta Halo, kun antikva kaj majesta stilo, estis riparitaj kaj rekonstruitaj en Ming-dinastio (1368—1644 p. K.) kaj Ĉing-dinastio (1644—1911 p. K.). En la templo estas ŝtonplato, kies epigrafo kaj kaligrafaĵo estis faritaj de eminentuloj de Jŭan-dinastio (1271—1368 p. K.). La templo Tajhuj okcidente ekster la urbo estis konstruita antaŭ 600 jaroj. La tegmento de la plej granda halo estas tegita per kupraj tegoloj kaj ĝiaj traboj estas elegante gravuritaj aŭ kun pentraĵoj, ili vidiĝas impone kaj majeste. La blank-marmoraj koridoraj kolonoj norde kaj sude de la halo surhavas vive alt-reliefajn drakojn, kies kapo elstaras pli ol 30 centimetrojn, kvazaŭ ili estus forflugantaj. Sur la muroj estas inkrustitaj centoj da orbrilaj budhostatuoj en diversaj pozoj, kiuj estas rigardataj kiel monumentaj verkoj.

Inter granda nombro da historiaj objektoj tiuj de Ĉu-regno estas la plej valoraj. Kvankam Ĝjinar-urbo jam fariĝis ruino, tamen ĝiaj historiaj postsignoj ne

estas tute neniigitaj de la senkompataj militoj. Hodiaŭ restas ĉirkaŭ ĝi urbomuro, ĝenerale alta 3-5 metrojn kaj la parto plej alta pli ol sep metrojn. Ĝia proksimume kvadrata urbo okupas areon de 16 kvadrataj kilometroj kaj estas iom pli granda ol la nuna Ĝjangling. Dum la pasintaj 20 jaroj oni multfoje faris grandskalan boradon kaj prifosadon en Ĝjnan-urbo por esplori la kulturon de Ĉu-regno, trovis bazamenton de unu granda palaco, pli ol 400 putojn, la urbopordojn kaj ĝian ĉirkaŭ-riveron. Krome, oni trovis ankaŭ ceramikaĵ-farejojn en ĝia nordorienta parto kaj kupraĵ-muldejojn en ĝia sudokcidenta parto. Granda nombro da tomboj de Ĉu-regno trovitaj en ĝia ĉirkaŭaĵo kun multaj historiaj objektoj havas gravan signifon por esplori la kulturon de Ĉu-regno. Tial Ĝjnan-urbo estas


honorita de ĉinaj arkeologoj kaj historiistoj kiel "jado rara en suda Ĉinio".

Ĉinaj arkeologoj prifosis tie pli ol 30 antikvajn tombojn kaj elterigis grandan nombron da historiaj objektoj. La spado de Goŭ Ĉjan, reĝo de Jŭe-regno, elterigita en 1965 en antikva tombo, estas 60.8 centimetrojn longa kaj surhavas romboformajn desegnojn. Ĝi estas orbrila kaj akra post 2 000 jaroj. En 1975 oni en Fenikso-monto de Ĝjnan-urbo prifosis tombon de Okcidenta Han-dinastio kaj elterigis ĉ. 500 historiajn objektojn kaj unu viran kadavron bone konservitan. Laŭ la noto sur bambuaj slipoj en la tombo, la mortinto estis enterigita en 167 a. K. Lia rango estis iom pli malalta ol tiu de guberniestro. La kadavro estis sufiĉe kompleta, ĝiaj haŭto kaj muskoloj havis elastecon. Ĝiaj 32

dentoj estis fortikaj kaj la artikoj de la membroj moveblaj. En la komenco de 1982 oni prifosis sur Baling-monto okcidente de la urbo ankaŭ tombon de Ĉu-regno antaŭ 2 300 jaroj kaj elterigis nombron da delikataj silkaĵoj.

En la historio Ĝjangling estis loko de famuloj. Nordoriente de ĝi estas la tombo de s-ino Fan, politikistino de Ĉu-regno en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno; ekster la norda pordego staras templo konstruita de posteuloj memore al Ĉju Jŭan, la granda patriota poeto de Ĉu-regno; sur la suda pordego estas la antikva turo Ĉjuĝjang; kaj en la antaŭurbo sin trovas multaj vizitindaj lokoj. Kaj krome, belaj poemoj de diverstempaj poetoj kaj gvatturoj konstruitaj dum bataltempo por kapti Ĝingĝoŭ montris la urbon antikva kaj poezia.

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Ĉengdu
2. Siĝjaĝŭang
3. Ĝengding
4. Manĉeng
5. Tangŝjan
6. Hangĝoŭ
7. Jangĝoŭ
8. Tajhu-lago
9. Julin
10. Ĝjamusi
11. Ŝanhajo
12. Uhan
13. Ĉongĉing
14. Turpan
15. Ĝaŭĉing
16. Pekino
17. Ĝinggang-montaro
18. Ciping
19. Ĝjangling

La antikva urbo Ĝjangling



Fotoj de LÜO ÜENFA kaj HÜANG FACJÜAN



La antikva urbo en malproksimo




La Ĉiela Pordego ekster Zuŝi-halo de la templo Kajjüan, konstruita en la oka jarcento



La kolore laki-
a lignoskulpta-
o farita en la
periodo de Mili-
tantaj Regnoj
475 a.K. — 221
a.K.)



Parto de Ĝjangling



Spado de la Ĵue-regna reĝo Goŭ Ĝjan, elterigita en la Feniksa Monto de Ĝjangling. Ĝi ankoraŭ estas tre akra post pli ol 2 000 jaroj.

La templo Tajhuj okcidente de Ĝjangling, konstruita en la 14-a jarcento



Kolonoj kun gravuritaĵoj ekster halo de la templo Tajhuj



Nova kajo de Ĝjangling

Nova disvolviĝo de la ĉina Esperanto-movado

PRi la historio de la ĉina Esperanto-movado mi jam konigis al la legantoj en EPĈ, n-roj 2-4, 1982. De tiam la ĉina Esp-movado havas multan novan disvolviĝon, kiu ne nur vekas atenton de la tutmonda esperantistaro, sed ankaŭ interesas novaĝagentejojn kaj ĵurnalajn redakciojn en la mondo. Iuj novaĝagentejoj jam plurfoje transpublikigis informojn pri esperantista aktivado en Ĉinio, dissenditajn de la Novaĝagentejo Ŝinhŭa. Raportisto de Usona Disaŭdiga Kompanio en Ĉinio faris televidan programeron pri la aktivadoj de la Somera Semajno de pekinaj esperantistoj. En la kuranta jaro, estro de la pekina sekcio de la Unuiĝinta Novaĝagentejo Internacia, raportisto de Los-Anĝeleso Tempo en Pekino kaj estro de la Pekina Buroo de Voĉo de Usono intervjuis Ĝang Ĉjiĉeng, la ĝeneralan sekretarion de ĈEL. Kiajn aspektojn havas la nova disvolviĝo de la ĉina Esperanto-movado en la lastaj jaroj?

ESPERANTISTAJ ORGANIZOJ TRA LA TUTA LANDO

Antaŭ kelkaj jaroj en Ĉinio estis nur unu esperantista organizo, nome la Ĉina Esperanto-Ligo. Sed nun diversaj esperantistaj organizoj fondiĝis en preskaŭ ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj en multaj grandaj kaj mezgrandaj urboj. Per tio sin karakterizis la ĉina Esperanto-movado en la lastaj jaroj.

En aŭgusto de 1979, okazis en Pekino la dua Ĉina Esperanta Laborkunveno. Post tio esperantistoj de diversaj lokoj komencis propagandi Esperanton diversmaniere en la socio, fondi Esperanto-kursojn, kulturi novajn esperantistojn kaj aliflanke fari preparon por fondi sian organizon. Ĝis la fino de aprilo de la kuranta jaro aperis jam Esperanto-asocioj aŭ preparaj grupoj de E-Asocioj en 22 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, kiaj estas Hubej, Interna Mongolio, Ningŝja, Anhuj, Ĝjansu, Fuĝjan, Gŭangdong, Junnan, Siĉŭan, Ĝjilin, Ŝandong, Pekino, Ŝanhajo, Tjanĝin k.a.; aperis similaj organizoj ankaŭ en Ĉengdu, Ĉongĉing, Uhan, Huhhot, Ŝji'an, Langou, Ĉangĉun, Ŝiĝjaĝŭang, Hangĝou, Suĝou, Hŭangŝi, Nanning kaj aliaj dekoj da grandaj kaj mezgrandaj urboj. Eĉ en iuj gubernioj aperis esperantistaj societoj aŭ grupoj. Fondiĝis ankaŭ fakaj organizoj de esperantistoj, ekzemple, la Fervojistaj Esperantista Asocio de la Huhota Fervoja Administracio, la Trafika Esperanto-Asocio de Gŭangŝji, Medicinista-Esperantista Asocio de la Huj-nacieca Aŭtonoma Subregiono de Ĉangĝji. Krome, iras preparado por fondi sciencteknikajn Esperanto-organizaĵojn. Oni povas diri, ke tio estas senprecedenca en la historio de la ĉina Esperanto-movado.

Ankoraŭ pli ĝojige estas, ke tiuj organizoj tuj post sia fondiĝo

fervore faras propagandon kaj disvastigadon de Esperanto en kombino de sialokaj cirkonstancoj. Iuj okazigis Esperanto-ekspozicion, konsultiĝan kaj servan aktivadon pri Esperanto, aliaj funkciigis Esperantan disaŭdigan kurson kunlaborante kun sialoka radiostacio, kaj triaj havigis felietonon por konigi nian lingvon. Samtempe kun tio, ili ofte funkciigis Esperanto-kursojn kaj okazigis konkursojn de tradukado, parolado kaj verkado en Esperanto, somerajn semajnojn kaj simpoziojn, en kiuj partoprenis ankaŭ esperantistoj el multaj aliaj provincoj kaj urboj.

Ni devas mencii aparte, ke plejparto de la esperantistaj organizoj havas propran organon. Laŭ statistiko, en la tuta lando estas sume 6 tipografiaj Esperanto-periodaĵoj, nome "La Mondo", organo de ĈEL, "Lernado de Esperanto" de la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio, "La Estonteco" de la Junnan-a Esperanto-Asocio, "Lernado" de la Anhuj-a Esperanto-Asocio, "Esperanto-Amanto" de la Hŭajnan-a Koresponda Lernejo de Esperanto kaj "Koresponda Esperanto-Kurso" de Hŭangŝi. Ĉiu el ili havas milojn kaj eĉ dekmilojn da legantoj.

Cetere, en la tuta lando estas ankaŭ pli ol 80 mimeografitaj revuoj, ekzemple "Nova Floro" de la Hŭangŝi-a Esperanto-Asocio, "Dolĉa Roso" de la Ĝengĝang-a Esperanto-Asocio,



Konsulta stacio de la Ĉengdu-a Esperanto-Asocio



Prezentado de programeroj post simpozio okazigita de la Lanĝoŭ-a Esperanto-Asocio

“La Vojo” de la Lanĝoŭ-a Esperanto-Asocio, “Interfluo” de la Suĝoŭ-a Esperanto-Ligo. Ili havas legantojn ĉefe sialokajn. Ili enhavas lernomaterialojn, fundamentajn sciojn pri Esperanto, novaĵojn pri en- kaj eksterlandaj Esperanto-aktivadoj k.s. Multaj el ili donas paĝon al prov-verkado de komencantoj. Ili ja ĝuas bo-

nan renomon ĉe la legantoj, pro siaj konciza enhavo, rapida informado kaj tereno por ekzerciĝo de komencantoj.

Esperantistoj de diversaj lokoj havas sian organizon kaj sian periodaĵon, per kiuj oni povas ĝustatempe kaj efike interfluigi informojn kaj spertojn, lerni unu de alia, kuraĝigi unu alian kaj

multe vigligi la ĉinan Esperanto-movadon.

KORESPONDA INSTRUADO

En la ĉina Esperanto-movado estas bona tradicio funkciigi korespondan lernejon de Esperanto. De la komenco de la nuna jarcento en Ĉinio aperis sinsekve korespondaj lernejoj. En la lastaj jaroj pli kaj pli multiĝis homoj, kiuj deziris lerni nian lingvon. Konforme al tio aperis pluraj korespondaj lernejoj tra la tuta lando. Tiuj lernejoj mem verkis lernolibron, kompilis informilon kaj starigis diversloke helpopunktojn por pli bone instrui Esperanton. Tio estas tre bonevena al la vastaj amasoj de Esperanto-amantoj kaj precipe al la gejunuloj. Kaj jam pli ol 100 000 homoj lernis siatempe Esperanton.

Krome, “Lernado de Esperanto”, organo de la Ĉongĉing-a Esperanto-Asocio, “La Estonteco”, organo de la Junnan-a Esperanto-Asocio, kaj “Scienco kaj Homo” eldonata de la Scienca kaj Teknika Asocio de Uhan, faras en si instruadon de Esperanto kaj miloj da homoj jam komencis lerni pere de tiuj gazetoj.

La supre menciitaj aferoj okazintaj en la lastaj jaroj diris, ke koresponda kaj gazeta lernigoj de Esperanto estas efikaj formoj por popularigi Esperanton kaj elkulturi esperantistojn en tia lando, kia Ĉinio kun vasta teritorio kaj multaj loĝantoj. Tio postulas nek specialan sidejon de lernejo, nek grandan kvanton da instruaj instalaĵoj, nek multan investon. Iom da kotizo jam sufiĉas por subteni la funkciigon ekonomie. Tia formo bone efikas jaron post jaro, se oni faras bonan organizon.

ESPERANTO EN SUPERAJ LERNEJOJ

Meze de la 6-a jardeko, la Eduka Ministerio de Ĉinio faris specialan dokumenton sankciante instrui Esperanton en superaj lernejoj kaj institutoj, kiuj havis kondiĉon por tio. Kaj kelkaj universitatoj plenumis tion. Sed poste oni ne donis plu lecionojn de Esperanto. Nur en 1979 la instruado de Esperanto rekomenciĝis en iuj superaj lernejoj.

En decembro de 1982 la Eduka Ministerio de Ĉinio disdonis dokumenton, reasertante ke Esperanto povas esti instruata kiel la dua fremda lingvo, kaj difinante, ke Esperanto estu unu el la nedevigaj lernobjektoj en la ekzameno de studenta diplomitiĝo, kandidatiĝo de studento-esploristo kaj en oficista ekzameno. En iuj superaj lernejoj kaj sciencsploraj unuoj jam pluraj instruistoj kaj sciencsploristoj promociiĝis trapasinte la ekzamenon de Esperanto kiel la dua fremda lingvo. Tio ege spronis la homojn al lernado de Esperanto. Nun en la tuta lando jam 20 superaj lernejoj donas Esperantajn lecionojn nedevigajn kaj funkciigas specialan kurson de Esperanto. Pli ol 30 superaj lernejoj funkciigas libertempan Esperantokurson, kiun vizitas ne nur studentoj, sed ankaŭ respondeculoj kaj profesoroj de la lernejoj.

Kompreneble, instrui Esperanton en ankoraŭ pli multaj superaj lernejoj estas malfacile almenaŭ pro du punktoj: unue, mankas trejnitaj instruistoj. Por solvi la problemon la Ĉina Esperanto-Ligo funkciigas kun la sankcio de la Eduka Ministerio tri porinstruistajn kursojn de Esperanto de 1981 ĝis nun. El ili diplomitiĝis jam 41 instruistoj venintaj el 39 superaj lernejoj. Kompreneble

tio ne povas kontentigi la bezonon, sed ni jam faris ĝojigan paŝon sur la vojo por solvi la problemon. Due, mankas taŭga lernolibro por studentoj, inkluzive de lernolibroj por studentoj fremdlingvaj kaj alifakaj. Cetere, estas malmultaj lernomaterialoj, legaĵoj, vortaroj, referencaĵoj ktp. por studentoj kaj ankaŭ por gejunuloj en la socio. Des pli malfacile akireblas esperantaĵoj eldonitaj de aliaj landoj. En la

lastaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj diverslokaj Esperanto-asocioj eldonis 60-70 librojn en kvanto de kelkcent titoloj da ekzempleroj, tamen tio ne povas kontentigi la pli kaj pli fortan postulon de enlandaj Esperanto-amantoj.

SUBTENO DE DIVERSAJ SOCIAJ RONDOJ

En Ĉinio la Esperanto-movado ricevas subtenon ne nur de la

Esperantaj libroj kaj gazetoj eldonitaj de lokaj Esp-asocioj de Ĉinio en la lastaj jaroj



KIAM la homoj atingas sian mezaĝon, ili devas moderigi sian manĝon: ne tro manĝi nek tro trinki. Certe dikiĝos ĉiuj aĝuloj, se ili ne moderigas sian manĝon nek multe partoprenas en korpoekzercado. Se la mezaĝuloj ne atentis pri forigo de la akumuliganta graso en la korpo, nek moderigas sian manĝon, ili do pli kaj pli dikiĝos kaj fariĝos korpulentaj. Tiam malsano kaj ĉagreno atakos ilin seninterrompe.

Post dikiĝo iuj klopodas ĉiamaniere moderigi manĝon, sed tio ne utilas por garantii kaj ekvilibrigi diversspecajn nutrajn elementojn necesajn por la korpo. Kompreneble, oni devas havi bonan kutimon preni manĝon en difinitaj tempo kaj kvanto, mal multe preni manĝaĵojn kun alta kalorio, ekz. sukeron, amelon kaj bestan grason. Tamen, la plej efika rimedo por malgrasigo estas aktive partopreni en korpoekzercado.

La metodoj de korpoekzercado por malgrasigo konsistas el multaj eroj. Ĉi-sube ni prezentas al niaj legantoj bonefikan kaj simplan korpoekzercaron, kiun oni devas fari tri sinsekvajn monatojn.




POR VIA SANO

Malgrasiga terapio por mezaĝuloj

de MU MING

1. Ekzerci la abdomenon kaj talion: rekte stari kun la kruroj disigitaj, levi la dekstran brakon super la kapon kaj etendi la maldekstran suben ĝis la maldekstra kokso (teni ambaŭ brakojn rektaj). Poste, kun la talio kiel akso, modere kaj simetrie movi la dekstran brakon maldekstren kaj la maldekstran dekstren. Poste fari la movojn en inversa direkto. Ripeti la movojn po kvar fojoj en la maldekstra kaj dekstra direktoj. Tio formas unu kompletan da movoj. En la komenco alterne ripeti ses kompletojn da movoj kaj poste iom post iom eĉ 20. (Bv. vidi bildon 1)

2. Ekzerci sin por fortigi kaj lertigi la piedojn: stari kun la



Bildo 1

ĉina registaro, sed ankaŭ de diversaj sociaj rondoj. En decembro de 1981, iniciatite de Ĉu Tunan, Hujucz, Bakin, Ŝja Jan kaj aliaj sume 10 famaj personoj, fondiĝis "Amikoj de Esperanto", kiu havas nun jam pli ol 130 membrojn. Plejparto de la membroj estas famaj personoj en la lando aŭ provinco kaj urbo, kaj multaj el ili estas reprezentantoj de la Tutlanda Popola Kongreso aŭ membroj de la Ĉina Popola

Politika Interkonsiliĝa Konferenco.


Krome, diverslokaj federacioj de socisciencaj asocioj, scienc-teknikaj asocioj, laboristaj sindikatoj, organizoj de Komunisma Junulara Ligo kaj demokratiaj partioj donas multe da moralaj aŭ financaj subtenoj al sialokaj esperantistaj organizoj. Bibliotekoj, kulturaj domoj kaj lernejoj de iuj provincoj kaj urboj liveras

al la esperantistaj organizoj kapitalon aŭ lokon por ilia aktivado.

Ankaŭ la ĉina ĵurnalisma rondo donas aktivan subtenon al la Esperanto-movado. En la lastaj jaroj, dekoj da gazetoj, ĵurnaloj, radiostacioj kaj televido de Ĉinio raportis pri esperantistaj aktivadoj aŭ konigis koncernajn sciojn pri Esperanto, kiuj multe interesis la publikon pri nia ling-

kruroj disigitaj, movi la maldekstran piedon antaŭen je unu paŝo, genuiĝi sur la planko per la dekstra kruro kaj teni la supran korpon laŭeble rekta tamen malstreĉa. Post kelkaj sekundoj genuiĝi per la alia. En la komenco iuj ne povas teni la supran korpon rekta dum la genuiĝo, do ili povas meti tabureton aŭ apogseĝon sub la genuon. Unue fari la movojn 6-foje kaj poste iom post iom eĉ 20-foje. Fari la ekzercadon pacience, precipe en la komenco. Fininte ĝin, oni devas masaĝi la krurojn, eĉ se la muskoloj de la kruroj ŝajnas molaj. (Bv. vidi bildon 2)

Bildo 2



3. Ekzerci la brakojn kaj bruston: sidi kun la kruroj krucitaj kaj alnivelegi la brakojn al la ŝultroj (Bv. vidi bildon 3), levi ilin alten ambaŭflanke de la kapo, por ke ili havu Y-formon. Poste interkruci la brakojn, fleksi la kubutojn kaj mallevi la brakojn antaŭ la brusto. Dum la ekzercado la brakoj faras du grandajn cirklojn. Fari la movojn 6 fojojn komence kaj poste iom post iom eĉ 12 fojojn.

Poste levi la brakojn antaŭen horizontale, svingi unu supren kaj la alian malsupren. Tiel ripeti la movojn 24-foje kun la brakoj malstreĉaj.

4. Ekzerci la kapon kaj nukon: sidi kun la kruroj krucitaj kaj brakoj libere pendantaj ambaŭflanke de la korpo. Klini la kapon al la dekstra flanko kaj movi ĝin cirkle posten, maldekstren, antaŭen kaj dekstren. Ripeti la movojn 8-foje. Se la ekzercanto aŭdas kraketon ĉe la nuko, tio ne gravas. Post momento tio mildiĝas. Oni ankaŭ povas klini la kapon antaŭen kaj skui ĝin ambaŭflanken po ok fojoj. Ripeti la movojn 24-foje.

Tiun ekzercaron povas akompani aliaj eksterdomaj sportaj aktivadoj por ekzerci la muskolojn de ĉiuj korp parto.

Bildo 3



vo. Iuj gazetoj kaj radiostacioj funkciigis Esperanto-kurson. Iuj televidaj stacioj faris dokumentajn programerojn pri esperantistaj aktivadoj kaj filmojn pri Esperanto, dank' al kio pli multaj en la socio havis konon pri Esperanto.

En la lastaj jaroj ĉinaj esperantistoj de diversaj lokoj faris multe da laboroj. Ili vizitadis famajn personojn, kiuj lernis aŭ iel sciis

pri Esperanto en la pasinteco, por gajni ilian subtenon al nia movado. Ĉinaj esperantistoj ankaŭ propagandis Esperanton en diversaj sociaj rondoj, precipe en la ĵurnalisma rondo kaj popolaj organizoj, donacante materialojn pri Esperanto aŭ invitante ilin ĉeesti aktivadon de esperantista organizo. Se iuj esprimis inklinon aŭ nur scivolon lerni Esperanton, ili tuj donis fervoran helpon kaj intimigis la rilatojn de tiuj rondoj

kun sialoka esperantista organizo. Dank' al tiaj senlacaj laboroj, diversaj sociaj rondoj pli kaj pli simpatias kaj subtenas la Esperanto-movadon en Ĉinio. Ni do povas antaŭvidi, ke la 71a UK en 1986, okazonta en Pekino, certe estigos ankoraŭ pli grandajn sociajn efĥojn. Estas ja motivo konvinkiĝi, ke en la lastaj jaroj de la 8a jardeko la ĉina Esperanto-movado ankoraŭ pli prosperos kaj pompos.

El mia vivo

de BRATOŝ IVAN (Jugoslavio)



S-ro I. Bratoŝ

MI naskiĝis 24. XI. 1896 al gepatroj-terkulturistoj kiel la sepa infano en la periferio de la urbo TRIESTO, tiam ankoraŭ parto de la monarĥio Aŭstro-Hungara. Post la fino de la 4-a klaso de la slovenlingva elementa lernejo, mi eniris la duklasan preparlernejon, por tie ellerni la germanan lingvon. Tiam en Triesto ekzistis itallingva gimnazio por la itala plimulto kaj la germanlingva gimnazio por gefiloj de la germanlingva ŝtata oficistaro, dum la slovena malplimulto (minoritato) ne havis slovenan gimnazion. La slovenoj do, por esti akceptitaj en la germanan gimnazion, devis ellerni la germanan lingvon, ĉu en la menciita preparlernejo aŭ helpe de privataj

instruantoj. Do por slovenoj tiel ekzistis diskriminacio.

Estis la jaro 1913, kiam mi vizitadis gimnazion kaj preterirante en la malnova parto de Triesto proksime de gimnazio troviĝis iu malgranda juda librovendejo, en kies montrofenestro mi ekvidis libreton kun la surskribo "Esperanto, lingvo internacia". Mi tuj eksentis, kiom signifa estus ekposedo de la internacia lingvo, kiu forigus diskriminacion, jam spertitan de la slovena minoritato. Sed pro manko de tempo, mi tiam ne plu interesiĝis pri ĝi.

Fininte la kvaran klason de tiu gimnazio, mi transiris el la privata duklasa slovenlingva komerca lernejo. En aprilo 1915 mi estis mobilizita en la aŭstran armeon. La finan ekzamenon en tiu lernejo mi pro tio faris antaŭtempe. Dum la Unua Mondmilito mi estis vundita kaj post la resaniĝo oni min denove sendis al la batalkampo en la suda Tirolo. La 2-an de novembro 1918, la aŭstra armeo, tute elĉerpita, akceptis armisticon kun Italujo. Ni batalintoj tre ĝojis en espero, ke la milito finiĝos, sed okazis, ke la itala armeo ne respektis la armisticon kaj aŭdinte de ili, ke oni nin baldaŭ sendos hejmen, ni sen iu rezisto lasis nin konduki al la norda Italujo. Oni traktis nin kiel militkaptitojn. Du tagojn oni

lasis nin sen iu nutraĵo, lokis nin sur nuda kampo sub tendoj, sen iu pajlo. La manĝaĵo estis tre magra, kaj post unu monato oni kolektis jugoslavdevenajn soldatojn kaj sendis nin sur la iaman batalkampon por tie kolekti municion kaj armilojn. Nur en majo 1919 oni min lasis el militkaptitejo sendante min bonŝance al Triesto. Aliaj "militkaptitoj" estis senditaj hejmen nur ĉirkaŭ unu jaron pli poste.

Mi tuj post la hejmeveno, komencis serĉi postenon ĉe diversaj entreprenoj kiel librotenisto aŭ oficisto, tamen ne sukcesis, ĉar jam mia nomo (Bratoŝ) montris, ke mi estas sloveno. Do mi kun miaj gepatroj elmigris el Triesto al la nove fondita suda jugoslava ŝtato en la urbon Maribor, kie mi fine trovis okupon.

El ĉio, kion mi supre priskribis, evidentas granda maljustaĵo kaj diskriminacio, kiun mi suferis. Suferis ankaŭ la slovena loĝantaro, restanta sub la regado de Italujo.

En aŭtuno de la jaro 1924 mi legis en la lokaj gazetoj de Maribor, ke okazos Esperanto-kursoj. Tiam mi ekmemoris pri la okazintaĵo de la jaro 1913. Mi enskribiĝis en la kurson, en kiu mi pro la ioma kono de la latina kaj itala lingvoj rapide ellernis Esperanton kaj fariĝis fidela esperantisto. Jam en majo 1926 mi alprenis funkcion de kasisto en la Sudslava Esperanta kongreso kaj de tiam mi aktivis en Esperanto-societo Maribor, kiel estrarano, kasisto, sekretario kaj prezidanto. Dum la Dua Mondmilito (1941-1945) la naziistoj, kiuj okupis Mariboron kaj la sudan Stirion, malpermesis agadon al negermanaj kulturaj societoj kaj same ankaŭ al Esperanto-societo, ili ankaŭ neniigis la bibliotekon.



Ilustraĵo de Ŭang Ĝaŭhuj

Post kiam infano falis de etaĝdomo...

SE la infano ne havus sur la kapo bandaĝon, vi neniel povus kredi, ke li falis de la tria etaĝo antaŭ unu semajno. La falinto estas nomata Ĝang Ĝjun kaj havas tri jarojn. Ĉiu, kiu vidas lin, ŝatas karesi lian ĉarman vizaĝeton.

La gepatroj de Ĝang Ĝjun loĝas en Pekino. Li estas solfilo, kompreneble, tre dorlotata. En iu posttagmezo, kiam la infano estis en dormado, la patrino eliris

preni bovinan lakton ferminte la pordon kaj fenestrojn.

Apenaŭ la patrino iris for, kiam la infano vekigis. "Malferminte la okulojn, mi vidis, ke la patrino ne estas en la ĉambro kaj la pordo ŝlosita. Mi grimpis sur la fenestron kaj donis al ĝi fortan puŝon. Bum! mi falis. . ." vive raportis Ĝang Ĝjun.

Li peze falis sur la teron, la kapo frapiĝis kontraŭ ferstango kaj vundiĝis. Hazarde okazis, ke tion vidis onklo Jang en alia etaĝdomo. Li ekkriis de timo, kuris al Ĝang Ĝjun kaj ĉirkaŭprenis lin en la brakojn. Tuj poste alkuris ankaŭ la najbara onklino Ŭang. Ili unue bandaĝis la kapon de la infano kaj haltigis ĵipon por rapide porti lin al hospitalo.

En la hospitalo Ĝang Ĝjun kviete kuŝis en lito kaj ricevis ekzamenon, sterilizadon kaj x-fotografadon. Jang kaj Ŭang restis ĉe la infano en la tuta proceso.

Venis la patrino de Ĝang Ĝjun, la patro, kiu ĵus revenis de alia loko post oficvojaĝo, kaj iuj najbaroj. La gepatroj estis forte kortuŝitaj vidante, ke multaj zorgas ilian filon.

Post du tagoj Ĝang Ĝjun gaje elhospitaliĝis. Krom la kunkudrita vundo sur la kapo kaj bluaĵo sur la gambo, oni ne trovis aliajn perturbojn.

La gepatroj de Ĝang Ĝjun iris kun multevaloraj donacoj por danki la du bonkorulojn, sed ili ĝentile rifuzis la donacojn. Ili diris: "Tio estas nia plenumenda devo!"

Post la liberiĝo kelkajn jarojn la loĝantaro okupis sin per forigado de ruinoj, kaŭzita per bombardado dum la Dua Mondmilito.

Nur en la jaro 1948 denove ekvivis Esperanto-societo en Maribor, kies prezidantecon oni konfidis al mi. La societano Ludoviko Prebil estas mia bona kunlaboranto. Ĉe li mi iam ekvidis (eble en la jaro 1971) la ĉinan revuon "El Popola Ĉinio" kaj en la jaro 1972 mi transprenis la

perantecon por tiu revuo. Ĝi de jaro al jaro enhance kaj aspekte progresis, aperadas interesaj artikoloj pri la ekonomia kaj kultura vivo de Ĉinio kaj en la lastaj jaroj ankaŭ pri Esperanto-movado. Tial la revuo EPĈ fariĝis fonto de sciindaĵoj kaj informoj ne nur pri Ĉinio, sed ankaŭ mondscale. Granda allogo por abonantoj estas ankaŭ belaj koloraj bildoj en la revuo mem kaj speciale en la kalendaroj, kies prezo estas inkluzivita en la abonkotizon.

Impona estas ankaŭ la eldonado de libroj en Esperanto.

Mi bedaŭras, ke mi ne plu povas esti peranto pro la aĝo de 87 jaroj, tamen mia sekvantino ROJC ZDENKA (Strossmayerjeva 8,62000 Maribor) certe bone daŭrigos la perantecon. Fine mi dankas al la administracio de EPĈ por afabla kunlaboro kaj deziras al ĝi bonan sukceson en la agado por Esperanto-movado kaj pri amikiĝo de niaj popoloj kun la granda nacio de Ĉinio!

Pitoreska montaro Ĝinggang

de ŬEJ LJAŬ

ĜINGGANG-MONTARO situas en la lim-regiono inter la provincoj Hunan kaj Ĝjangŝji. Ĝiaj montoj, simile al verdaj ekranoj, leviĝas unuj super aliaj kun valoj kaj ravinoj. La montaro kontinuas kelkcent kilometrojn kaj havas imponan aspekton kaj ĉarman pejzaĝon: Brile verdas la arboj kaj bambuoj, ŝvebas blankaj nuboj ĉe la montalioj kaj lirlas lazuraj riveretoj. La montoj kvazaŭ hontemaj knabinoj kaŝiĝas en nubaroj.

Ciping kuŝas en la centro de la montaro, kaj en ĝia sudo estas la gracia Nanŝan-parko, kiu okupas areon de 6.4 hektaroj. En la mezo de la parko troviĝas skulptaĵaro, kiu rakontas al la vizitantoj animskuan historion de la ĉina revolucio: Oktobre de 1927, Maŭ Zedong kun siaj leviĝantaj trupoj venis al Ĝinggang-montaro kaj tie fondis la unuan kamparan revolucion bazlokon de Ĉinio.

La revolucia flamo etendiĝis de tie al la tuta lando. Ĉirkaŭ la skulptaĵaro estas kvin terasoj por rigardi la pejzaĝojn. En la parko troviĝas ekspona salono, fiŝlageto kaj florapreca kiosko. Sur la terasoj oni povas rigardi la panoramon de Ciping kaj la imponajn montojn malproksimajn.

En valo 5-6 kilometrojn nord-okcidente de Ciping, pado iras malsupren laŭ zigzaga kruta rokmuro. Irinte de tie centojn da paŝoj, oni povas aŭdi plaŭdojn. Post kelkaj kurbiĝoj, oni vidas la unuan lageton de Longtan. Fal-

akvo rekte falas, de loko alta je ĉ. 40 metroj, en la lageton larĝan je pli ol dek metroj, estigante densan akvonebulon, kiu multe freŝigas la aeron. Tio sentigas al turistoj agrablون.

Ĉiu el la kvin lagetoj de Longtan havas falakvon unu apud alia. La falakvoj formis mirindan spektaklon.

La Kvinvingra Monto sude de Ciping je ĉ. 20 km. estas belega vidindejo. Ĝi ligiĝas kun la ĉefa montpinto de Ĝinggang-montaro en la okcidento. Ĝia plej alta montpinto Jangmej altas 1 357 metrojn, de sur kiu oni povas vidi groteskajn kaj imponajn montojn vualatajn de nubaroj. En gaza nebulo leviĝas montpinto kun antikvaj pinoj, kiuj kvazaŭ dancas en la vento, tial ĝi estas nomata Pina Insulo. Post ĝi staras du verdaj montpintoj, kiuj similas trinkantan duĝiban kameleon, tial ĝi ricevis la nomon Kamela Montpinto. Ĉirkaŭ la Pina Insulo estas profundaj valoj kun krutaj rokmuroj. En la valoj malklare vidiĝas de tempo al tempo diversformaj groteskaj rokoj kaj antikvaj pinoj.

Sur la duflankaj deklivoj de la Kvinvingra Monto en kontinuo de pluraj kilometroj prosperas vastaj rododendraj arbedaroj, kun meznombra alteco de 4-5 metroj kaj iuj eĉ altas 7-8 metrojn. Tie kreskas pli ol 30 specioj de rododendroj, ili unu post alia floras de aprilo ĝis junio. La rara specio estas Ĝinggang-rododendro malofte trovebla en aliaj

lokoj. Ĝi havas maldikajn trunkon kaj branĉojn kun folietoj, kaj ĝiaj hele purpur-ruĝaj floretoj estas amindaj. Ĝi taŭgas por fari envazajn pejzaĝojn.

Ĝinggang-montaro vere estas natura botanika kaj besta ĝardeno. Tie kreskas pli ol 3 800 specioj de altklasaj plantoj, kiaj tiuj de glacirivera periodo: folidoto (*Pholidota*) kaj abio. Tie vivas nuboleopardo (*Felis nebulosa*), rara cervo (*Rusa unicolor*), lofuro (*Lophura nycthemera*) kaj aliaj kelkdek specioj de raraj animaloj.

En Gujhŭaping de Ĝinggang-montaro estas osmantarbo pli-ol-500-jara kun prosperaj branĉoj kaj folioj kaj floroj elspirantaj bonodoron. Ankaŭ la subtera palaco de Liping kun diversaj okulplaĉaj stalagmitoj kaj stalaktitoj estas vidinda. En la regiono de Ĝinggang-montaro troviĝas pli ol 230 vidindejoj kaj vidindaĵoj, kiuj ĉiam allogas la turistojn per sia beleco.

Turistoj povas tie aĉeti lokajn produktaĵojn, ekz., bambuan ekranon, promenbastonon, nutroriĉan aktinidion (*Actinidia chinensis*), bongustan fungon, sekajn bambuidajn pecojn k. a. Tie turistoj ankaŭ povas frandi stufitan kokon kun giroforo (*Gyrophora*) kaj aliajn loke famajn pladojn.

La montaro estas ideala turisma loko, ĉar tie regas humida montara klimato de subtropiko, malvarmeto en vintro kaj modera varmo en somero.

ĜINGGANG-MONTARO

Fotoj de LIŬ ĈUNGEN




Nova fizionomio de Ciping



Akvofalo ĉe Longtan



Nubomaro su-
per Ĥuangjangĝje



Pinoj



La montpinto "Pina Insulo"



**FOTOJ FARITAJ
DE E-ISTOJ**



Sunsubiro en Piúma

de s-ro EDSON LISBOA FILHO (Brazilo)

KVIN JUNAJ JAPANAJ ESPERANTISTOJ VENOS EN ĈINION

En la fino de la pasinta jaro, kiam Hu Jaŭbang, la ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de K.P.Ĉ., vizitis Japanion, li invitis 3 000 japanajn junulojn gastigi en Ĉinio. Por akceli amikecon inter la junaj esperantistoj de Ĉinio kaj Japanio la Ĉina Junulara Federacio, la Ĉina Studenta Federacio kaj la Ĉina-Japana Amikeca Asocio invitis kvin junajn esperantistojn al Ĉinio por partopreni en la festivalo de la ĉinaj kaj japanaj gejunuloj. La redakcio de EPC varme bonvenigas tiujn kvin gastojn ĉe ĝi kaj deziras al ili ĉion bonan en Ĉinio.

ĈINA E-MOVADO INTERESAS FREMDLANDAJN JURNALISTOJN

La ĉina Esperanta movado en la lastaj jaroj vekis atenton ne nur de la ĉinaj ĵurnalistoj, sed ankaŭ de la alilandaj ĵurnalistoj laborantaj en Pekino. La 27-an de januaro la estro de la pekina sekcio de la Unuiĝinta Novaĝ-agentejo Internacia kaj ĵurnalisto de «Los-Anĝeleso Tempo» kune intervjuis Ĝang Ĉjiĉeng, la ĝeneralan sekretario de ĈEL pri la historio kaj la aktuala stato de Esperanto en Ĉinio. La 29-an de februaro «Los-Anĝeleso Tempo» publikigis artikolon pri tiu ĉi intervjuo, kiun transprenis «Internacia Herolda Tribuno». La Unuiĝinta Novaĝ-agentejo Internacia dissendis specialan artikolon pri ĝi, kiun represis ĵurnaloj en Japanio kaj Ĉilio. La 23-an de marto de la kuranta jaro Wayne L. Corey, ĉefo de la Pekina Buroo de Voĉo de Usono, faris intervjuon al Ĝang Ĉjiĉeng pri la stato de la ĉina E-movado. Kaj post kelkaj tagoj Voĉo de Usono disaŭdigis la menciitan intervjuon.

ESP-KURSO EN GŬANGŜJI-A NACIECA INSTITUTO

Sub la aŭspicioj de la Eduka Buroo de la Gŭangŝji-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono, la Gŭangŝji-a Nacieca Instituto ekfunkciigis Esperanto-kurson kiel nedevigan kurson por du grupoj de alta klaso de ĉinliteratura fakultato, en marto de la kuranta jaro. La kurso daŭros por unu grupo duonjaron kun ses lernhoroj semajne, kaj por la alia unu kaj duonan jarojn kun tri lernhoroj semajne. La kurson gvidas Ljang Ziming, membro de la prepara grupo de la Gŭangŝji-a Esperanto-Instituto. Antaŭ tio la Eduka Buroo de la regiono jam sciigis ĉiujn altlernejojn de la regiono, ke ili povas doni devigan aŭ nedevigan kurson de Esperanto, se la kondiĉoj estas permesitaj.

ESTABLIGO DE LA PREPARA KOMITATO DE LA ŜANDONG-A E-ASOCIO

La 4-an de aprilo establiĝis la Prepara Komitato de Ŝandong-a Esperanto-Asocio en la provinca ĉefurbo Ĝĵinan. En ĝia unua kunveno oni diskutis pri akcepto de membroj kaj prepara laboro por starigi la asocion.

DISKUTADO PER KORESPONDO EN TJANĜIN

Por plivastigi la influon de Esperanto kaj antaŭenpuŝi la Esperanto-movadon en Tjanĝin, la prepara grupo de la Tjanĝin-a Esperanto-Asocio okazigis korespondajn aktivadojn de E-amikoj en marto kaj aprilo. En ĝi partoprenis dek ok personuloj en politika, kultura kaj eduka rondoj. Iuj skribis leteron, esprimante sian subtenon al Esperanto-movado. Aliaj en la letero rememoris, kiel ili lernis Esperanton siatempe. Kaj triaj donis altan takson al la idealo de Esperanto kaj ĝia rolo en la nuna mondo. La "Tjanĝin-a

tagĵurnalo" informis la aktivadojn en sia unua paĝo.

"SILEZIAJ KANTOJ" APERIS EN LA ĈINA LINGVO

"Sileziaj Kantoj", fama poemaro verkita de Peter Beruc, poeto de Ĉeĥoslovakio, antaŭ nelonge estas eldonita ĉinlingve de la ĉina Eldonejo de Fremdlanda Literaturo. La poemaro estas ĉinigita de fama ĉina esperantisto Laŭ Ĵong laŭ la Esperanta traduko. La traduko estis polurita de fama esperantisto Sun Ĵong laŭ la ĉeĥa-lingva originalo. La 89-jara aŭtoro verkis epigrafon speciale por la ĉinigita poemaro, por esprimi sinceran amikecon de la ĉeĥoslovaka popolo al la ĉina popolo.



"Sileziaj Kantoj", poemaro verkita de P. Beruc

HELPU SRILANKAJN ESPERANTISTOJN

Dank' al prelego de Stefano Keller, Esperanto-instruisto de Kultura Centro Esperantista (KCE), pri Svislando, Esperanto kaj Kultura Centro Esperantista kaj ankaŭ dank' al lia instruado, proksimume 35-persona grupo de entuziasmaj srilankanoj daŭrigas la lernadon de la internacia lingvo en la Publika Biblioteko de Kolombo ĉiun mardan vesperon. Estas afero de ĉiuj esperantistoj apogi la

pormovadan agadon de novaj kaj malnovaj srilankaj esperantistoj per sendo de poŝtkarto, letero, Esperantaĵoj, legitaj gazetoj kaj libroj. Sendu viajn kontribuajojn rekte al: Esperanto-Grupo Sri Lanka, S-ro D. B. JESUDASAN, 'Poste restante', 71, Pagoda Para, NUGEGODA, Sri Lanka.

ESPERANTO-STAĜOJ POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESANTOJ

Kultura Centro Esperantista aranĝas esperanto-staĝojn por komencantoj kaj progresantoj dum la tuta jaro. Datoj de la venontaj esperanto-staĝoj por komencantoj en 1984: julio 15-20, aŭgusto 12-17 (paralele al Seminario pri MODERNA CSEH-METODO), septembro 2-7, septembro 23-28. Datoj de tiuj por progresantoj en 1984: julio 22-27, aŭgusto 19-24, (kadre de Rik-metoda Seminario) aŭgusto 26-31 (kadre de la 1-a

Seminario pri Konscio, Etiko kaj Mondkoncepto), septembro 9-14, septembro 16-21, septembro 30 — oktobro 5. Petu detalajn informojn de KCE, PF 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

EKAPERO DE "VOĈO DE HANDIKAPULOJ"

La nova gazeto "Voĉo de Handikapuloj" kiu ekaperas en 1984 estas dumonata organo de Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj. Abonprezo estas 12-DM aŭ egalvaloro. Abonon oni bonvolu direkti al la adreso: Voĉo de Handikapuloj, 56227-Borovo, Ŝkolska ul 25, Jugoslavio.

La gazeto eldonis du kolorajn insignojn, el kiuj unu estas dediĉita al 100-jara jubileo de Esperanto kaj la alia kun surskribo "Esperanto parolata". Poekzemplera prezo estas 2.-gld. aŭ egalvaloro.



Insigno farita de "Voĉo de Handikapuloj" por la 100-jara jubileo de Esperanto



DUMONATA GAZETO DE INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ

Eldonas:
Esperanto-societo „Fratoj Ribar” Borovo / Jugoslavio

Redaktas:

Dušan Adnadj kaj Vujadin Lukić

Kunredaktas:
Emilija Lapenna kaj Lucija Borčić

Redakcio:
56227 Borovo, Ŝkolska ul. 25, Jugoslavio

JARO: 1-a

NUMERO 1/84

PREZO: 2,5 gld.

Karaj legantoj!

En viaj manoj troviĝas nova gazeto. Ĝi ne proponas al vi tute simplan kaj kutiman enhavon. Ni liveras al vi specifan gazeton en kiu certa parto estas dediĉita al homoj kiuj naskiĝis aŭ travivis kruelan sorton.

Ne lamentante kaj plorante, ni deziras doni al ĉiuj vi eblecon esprimi viajn pensojn, sentojn, kreaĵojn, amon, komprenemon kaj homan dignon.

VOĈO estos eĥo de tiuj kiuj ĝis nun ne havis eblecon nek sukcesis publike kaj laŭte levi sian voĉon en Esperantujo. Ni atendas, ke ni ĉiuj, kaj handikapitaj kaj tiuj kiuj tio ne estas, fariĝu kunlaborantoj, amikoj kaj ni levu nian voĉon por kaj pro homa konscienco.

Nur komune, ni povas fari nian Movadon pli digna kaj pli homeca. Por atingi tion VOĈO atendas vian voĉon, helpon, abonon kaj subtenon.

La redaktantoj

EN LA CENTRO DE LA ATENTO



BERNARD GOLDEN

Troviĝantaj antaŭ la sojlo de nia 100-jara Jubileo, la nunan paeriodon de Esperanto-Movado karakterizas bedaŭrinde malunueca situacio. Kaj anstataŭ unuigi niajn fortojn, ni agas disharmonie kaj ĉiuj el ni atendas tiun jubileon tvazaŭ nian apartan. Pro tio al ni ŝajnas ke la instigopensa artikolo de Bernard Golden meritas vian aparian atenton kaj pritrakton, atendente de vi viajn opiniojn.

La redakcio



La plezur-boato "Tajhu"

ĈJAN ANKANG:

Memfarita Projektisto

POST kiam la antikva Granda Kanalo malfermiĝis al navigado en la parto de Hangĝoŭ ĝis Jangĝoŭ kiel turisma linio, multaj alilandaj turistoj tre admiras la pitoreskajn pejzaĝojn sur ĝiaj bordoj. Usona turisma kompanio decidis lui ĉinan plezur-boaton, por ke ĝiaj turistoj boate ĝuu la belaĵojn de la Granda Kanalo. La mastro de la kompanio persone veturis al Uŝji por elekti plezur-boaton. Li rigardis kvar plezur-boatojn kun malsamaj stiloj, sed ili ne tre plaĉis al li. Kiam li ŝetis sian rigardon sur la plezur-boaton "Tajhu", li ĝojĝis kaj tuj ĝin luis por unu jaro per 600 000 ĵuan-oj (ĉirkaŭ 300 000 usonaj dolaroj).

La novaĵo rapide disflugis. Multaj demandis, kiu majstre projektis la boaton "Tajhu". Fakte, tiu majstra projektinto ne estas fama specialisto pri ŝipkonstruado, sed la junulo Ŝju Datong, kiu akiris fakajn sciojn per memlerno. Li laboras en la teknika sekcio de la Ruĝflaga Ŝipkonstruejo de Uŝji.

Ŝju Datong naskiĝis en la familio de fama ŝipfaristo. Laŭdire, lia familio estis unu el la "Dek tri familioj kun kvin familiaj nomoj", titolitaj de la imperiestro Ĉjanlong, en la periodo de 1736-1795 p. K. de Ĉing-dinastio pro la kontribuo de liaj prapatroj en ŝipfarado. Liaj patro, avo kaj praavo ĉiuj estis ŝiplaboristoj, lia onklo estis projektisto kun 40-jara sperto en ŝipfaro. Ŝju Datong vivis apud la Granda Kanalo kaj estis multe influita de sia familio, tial li havis grandan intereson al ŝipoj jam en sia infaneco.

En 1966, kiam Ŝju Datong lernis en elementa mezlernejo, komenciĝis la "granda kultura revolucio", kiu kaŭzis dekjaran kaoson. La lernejo devigite ĉesis doni lecionojn. Liaj onklo kaj patrino kuraĝigis lin memlerni por estonte servi al la patrolando. Li memlernis fundamentajn lernobjektojn de la mezlernejo kaj poste fakajn sciojn pri ŝipfaro. Por kuraĝigi lin memlerni ŝipfaran teknikon, lia patrino volonte vivis ŝpare

kaj aĉetis por li desegnaj instrumentojn kaj multe da libroj pri ŝip-projekto kaj ŝip-faro. Lia onklo instruis en libertempo al li sciojn pri ŝip-faro kaj sian praktikan sperton. Ŝju Datong ofte staris apud la kanalo, atente observis ŝipojn kaj desegnis diversajn ŝipojn. Li eĉ naĝis sub ŝipon por koni la formon de ŝipkorpo. Por praktiki la akiritajn sciojn, li ofte faris imitan projekton. Post sesjara klopodo, li akiris fundamentajn teoriajn sciojn pri ŝip-projekto kaj desegnan teknikon.

En 1975, la Ruĝflaga Ŝipkonstruejo de Uŝji faris ekzamenon por akcepti teknikistojn, en ĝi partoprenis ankaŭ Ŝju Datong. La ekzamena temo estis projekto pri reformado de 19-metra trenŝipo. Ŝju Datong finis la ĉefan projektan desegnadon pri la ŝipkorpo nur en kvar tagoj kaj pro tio estis akceptita de la ŝipkonstruejo.


En la sekvanta jaro, 25-jara Ŝju Datong unuafoje prenis sur sin taskon projekti pramon uzotan en la lago Tajhu. Malgraŭ la streĉa laboro, li neniam ĉesis lerni. En libertempo li sisteme studis meĥanikan aŭtomatigon en la urba postlabora universitato. Li opinias, ke la tempo por ĉiu ajn homo estas egala: unu tago havas 24 horojn, neniujn havas pli aŭ malpli ol tiom. Sed la valoro de tempo estas malsama por malsamaj homoj. Ŝju sekvis sian kredon, strebis por fariĝi mastro de la tempo kaj kiel eble plej bone faris ŝip-projekton. En la lastaj jaroj, Ŝju projektis unu pramon,

du plezur-boatojn, faris reformadon al unu trenŝipo kaj unu rapid-boato.

La plezur-boato "Tajhu" estas sukcesa verko, la kristalo el lia diligenta memlernado dum multaj jaroj. La projekto de la plezur-boato devis atingi altan nivelon. Por projekti tiun novtipan plezur-boaton, li iris al biblioteko de iu projekta instituto de Ŝanhajo, kie li legis librojn kaj materialojn pri diversspecaj plezur-boatoj de la tuta lando. Krome, li rigardis plezur-boatan faradon de iu ŝanhaja ŝipkonstruejo. Tio ebligis al li ĉerpi ĉiujn avantaĝojn en komparado. Dank' al dujara diligenta esplorado kaj streĉa laboro, li sukcese projektis la plezur-boaton "Tajhu". Ĝi havas belan aspekton, vastan vidkampon, ferdekon sen kolonoj en tri flankoj, kajutojn ĉiudirekte travideblajn, konstant-temperaturan instalaĵon kaj elektre levatajn fenestrojn. Ĝi povas veturi en malprofunda akvo kaj havas bonan stabilecon kaj internacian nivelon en amortizo kaj bruelimino.

La projektado dufoje prokrastis la edziĝon de Ŝju Datong. Li diris al sia fianĉino: "Mi ne edziĝos antaŭ ol vidi la plezur-boaton". Post kiam la boato "Tajhu" ekveturis sur la vasta lago, ili ĝoje okazigis sian nupton. Nun ili jam havas knabeton kaj vivas feliĉe.

Lastatempe li projektis pliajn novajn plezur-boatojn belajn kaj komfortajn, kiuj ĝuas altan takson de luantoj kaj turistoj. Li estis promociita al asistanta inĝeniero.



*Ŝju Datong
en projektado*

(Daŭrigo de p. 37)

Fakte en la batalo kontraŭ leopardo, urso, ŝakalo kaj aliaj malamikoj la grandaj pandoj estas tre furiozaj. Post longa esplorado sciencistoj konvinkiĝis, ke en la prahistorio la pandoj estis karnovoraj, por tio ili bezonis tre akrajn dentojn. Kun media ŝanĝiĝo ili komencis preni bambuojn kiel sian ĉefan manĝaĵon, tamen la dentoj restis akraj. Manĝante, ili tranĉas bambuojn en pecetojn per siaj ĉizojaj dentoj. Ankaŭ ili povas dispremi kaprajn ostojn. Tamen kial ili ne tiel feroce batalas kontraŭ siaj samrasaj rivaloj? Oni diras, ke ankaŭ venenaj serpentoj malofte uzas siajn venenajn dentojn en luktado kontraŭ aliaj serpentoj. Ĉu la du fenomenoj estas kaŭzigitaj de la sama kialo? Estas interesa enigmo.

Kvietiĝis la batalejo. Ambaŭ rivaloj forte anhelis. Malkontentiĝis la digna "nobelino". Ĝi kapre mekis. Kvazaŭ sono de magia fluto, la meko ekscitis la duelojntojn. Jen la du virpandoj anhelantaj denove sin ĵetis en batalon. Ĉe la vespera krepuskiĝo la batalo finiĝis kaj la kompare magra besto konsterniĝe sin retiris. Kiam la venkito peze paŝanta ankoraŭ ne perdiĝis el la vidado, jam kontente leviĝis Ĝenĝen kaj ĝojplene dediĉis sian amon al la venkinta batalanto.

Ili alpaŝis kaj haltis tie, kie distancas nur je tri metroj de doktoro Shirer. La paro da geamantoj turnis nenian atenton al la kodako kaj komplete dronis en aman ludon.


En la sekvantaj tagoj Ĝenĝen ree vagadis proksime, dum la venkinta batalanto foriris sen-spure.


La radia spurado kaj lok-determino ŝajne estis simplaj, sed

fakte sufiĉe kompleksaj kaj malfacilaj. Lacigaj estis precipe la regula lok-determino kaj la dutagnokta deĵoro ĉiusemajne. Tio okazis ĝuste en neĝpluvaj tagoj, tiam la nokta temperaturo ofte falis ĝis 10 gradoj sub la nulo. Tiam profesoro Hu kaj doktoro Shirer ĉiu sole restis en obskura nokto en la primitiva arbaro, spite de vento, malvarmo kaj besta atako por gardi, observi la instrumentojn, aŭskulti kaj noti ĉiujn informojn de la monto. En la sekvanta tago ili devis esplori la postlasitan lokon de la

pandoj por koni ilian recepton, manĝkvanton kaj aliajn.

(Daŭrigo en la venonta numero)





LJU ĈENG:

Verda Majo sur la pekin-opera sceno

Geaktoroj de la pekin-opero "Verda Majo" kaj Liŭ Ŝjaŭlan (la tria de antaŭe), la filino de Verda Majo

LA alveno de ĉi verda majo vekis mian rememoron pri la brila ekzemplo de la esperantistoj, internaciisma batalantino — Verda Majo. Precipe hodiaŭ, kiam mi vidas la verdon post surscenigo de la Pekin-opero "Verda Majo", mi estas inspirata de ŝia sinoferema spirito.

Hasegawa Teru estis ŝia originala nomo. Ŝi estis japana esperantisto-verkisto. En 1936 ŝi aliĝis al la Japana Prolet-Esperantista Unio. Antaŭ la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en 1937 ŝi kun sia edzo Liŭ Ĵen venis al Ĉinio kaj sin okupis pri kontraŭjapana propaganda laboro en Ŝanhajo, Uhan, Ĉongĉing kaj aliaj urboj, multe kontribuante al la naci-liberiga afero de la ĉina popolo. Ŝi forpasis en januaro 1947 en Ĝjamusi, nord-orienta Ĉinio, tiam ŝi aĝis 35 jarojn.

Pro historiaj kaŭzoj la vastaj ĉina kaj japana popoloj ne konas la heroaĵojn de Verda Majo. Kvankam mi laboras en Ĝjamusi, kie ŝi batalis en siaj lastaj jaroj, bedaŭrinde, mi ne povis frue ŝin trovi kaj koni.

Nur en 1980, kiam en Ĝjamusi oni filmis eksterdomajn scenojn por la televida filmo "Hejmosopira Stelo" verkita de s-ro Iwama Yoshiki kaj kune produktita de

Ĉinio kaj Japanio, mi informiĝis pri Verda Majo — japana kontraŭmilita pioniro, kiu eterne ripozas en Ĝjamusi, loko 14 jarojn sub la botoj de la japanaj militaristoj. Unuafoje aŭskultinte ŝian biografion, mi estis tuj kaptita de emocio kaj respekto. Por oponi kontraŭ la agreso de la japanaj militaristoj kaj subteni la ĉinan popolon, ŝi forlasis sian patrolandon kaj verŝis sian ŝviton kaj sangon sur la ĉinan teron. Ĉu oni ne devas prikanti ŝin? Forta devosento puŝis min reaperigi ŝian batalan vivon per Pekin-opero, por ke pli da ĉinoj konu ŝin. Kun subteno de la Pekin-opera Trupo de Ĝjamusi mi komencis preparan laboron por verki la operon.

En 1982 la urba registaro de Ĝjamusi estis preta konstrui novan tombon kaj monumenton por Verda Majo kaj Liŭ Ĵen kaj okazigi ekspozicion. Mi ekveturis al diversaj lokoj por fari esplorojn kune kun la kolektantoj de objektoj uzitaj de la geedzoj. Ni vizitis ties amikojn, kolegojn, parencojn kaj gefilojn. Informiĝinte ke ni surscenigos la figuron de Verda Majo, ili emociiĝis kaj diris: "Tio estas multjara deziro de ni kaj ankaŭ de la ĉina popolo." Rememorante Verdajn Majojn, multaj veteranaj esperantis-

toj ne povis sin deteni de larmoj. Ili diris al mi, kiel ŝi antaŭ mikrofono malkaŝis en la flua japana lingvo la japanajn militaristojn per nerefuteblaj faktoj sen konsideri sian personan sekurecon, kaj kiel ŝi dividis ĝojon kaj malĝojon kune kun la ĉina popolo. . . Ĉio ĉi profunde gravuriĝis en mia koro.

Dum du jaroj ni kolektis multajn valorajn materialojn, kiuj kreis kondiĉojn por mia verkado.

Kiel dramisto, mi okupiĝis pri la ĉina tradicia teatraĵo jam 24 jarojn. Tamen mi estis ankoraŭ novico por verki operon kun tia temo kaj havis multajn malfacilojn.

La opero komenciĝas per tio, ke Liŭ Ĵen intencis reveni al la patrolando kaj Verda Majo devis fari alternativon. La intrigo malvolviĝas per ŝia rompo de la familia malhelpo, kaŝa forlaso de Japanio kaj alveno al Ĉinio; ŝia batalo por la alta idealo, ŝia persista subteno al la ĉina rezistmilito, eĉ en migranta malfacila vivo; kaj ŝia akiro de la rajto por batali kontraŭ japana agreso, dank' al Ĝoŭ Enlaj kaj Ĝuo Moĵuo. La opero bazita sur historiaj faktoj estas biografie verkita. Ĝi finiĝas per ŝiaj nordenveturo kaj forpaso en Ĝjamusi

post la venko de la Kontraŭjapanana Rezistmilito.

La Pekin-opera Trupo de Ĝjamusi prenis sur sin la taskon prezenti "Verda Majo". Ĝi ludigis siajn plej bonajn aktorojn kaj invitis al laboro reĝisoron, komponiston, dekoraciiston kaj koregrafon. Tan Ĝjunjing, membro de la Hejlongĝjang-provinca Filio de la Ĉina Dramista Asocio kaj ĉefaktoro de la trupo, ludis Verdanan Majon.

La 8-an de aŭgusto 1983 okazis la inaŭguro de la tombo de Verda Majo kaj Liŭ Ĵen sur la pitoreska Sifeng-monto de Ĝjamusi. Mi ĉeestis ĝin kaj renkontis denove Liŭ Ŝjaŭlan, filinon de Verda Majo. Ŝi emocie diris al mi: "Via trupo estas la unua en nia lando, kiu verkis kaj prezentas operon prikantantan miajn gepatrojn. La libreton mi jam tralegis. Ĝi reaperigis la batalan vivon de mia patrino. Mi deziras al vi sukceson en la prezentado!"

En la Nacia Festo, la 1-a de oktobro 1983, la trupo unuafoje surscenigis la Pekin-operon "Verda Majo" en Ĝjamusi. Post tiu tago ĝi prezentis sinsekve pli ol 30 fojojn kaj akceptis pli ol 30 000 spektantojn. Nemalmultaj recenzoj aperis sur ĵurnaloj. Iuj enlandaj esperantistoj sendis al ni gratulajn leterojn. La ĉefajn fragmentojn de la teatraĵo filmis la Japana-Ĉina Studio kaj enmetis ĝin en la duan parton de la filmo "Amika Tero". S-ro Murata Tatsuji, veterana reĝisoro de Japanio, diris: "Multaj japanoj delonge deziris rigardi Verdanan Majon sur ĉina sceno aŭ en ĉina filmo. Mi tre ĝojas, ke ĉi-foje mi vere vidis tion en Ĉinio. Mi kredas, ke nia filmo estos bonvena al la japanoj. Mi esperas akceli la amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj kun la opero kiel ligilo."



Li Ŝjueĉjŭan gvidas geknabojn en flutludo.

LI PING:

Sindonemo de flutisto

IUN antaŭtagmezon en la frua printempo de 1982, respondeculo de la Pekina Geknaba Domo ricevis neordinaran leteron. Ĝi tekstas jene: "Mi estas ĉefflutisto de la Centra Filharmonio de Ĉinio. Venis en mian kapon la ideo, ke mi volas fondi por geknaboj postlecian flutludan grupon sub via subteno. Por riĉigi ilian postlecian kulture vivon kaj kulturi iujn el ili en talentajn muzikistojn, mi volonte dediĉos mian energion." La skribinto estis Li Ŝjueĉjŭan.

Preskaŭ ĉiuj ĉinaj muzik-amanantoj scias lian nomon. Lia ludarto

estas tre alta. Li gajnis la oran medalon en la Internacia Flutluda Konkurso okazinta en Rumanio en 1955. Li ĝuas altan reputacion internacie kaj plurfoje kunlaboris kun multaj famaj eksterlandaj muzikistoj, kiuj venis en Ĉinion por prezentado, kaj starigis profundan amikecon kun ili. Fama orkestra direktisto Seiji Ozawa donis altan takson al lia fluta ludarto.

La respondeculo de la Pekina Geknaba Domo komisiis al Ŝaŭ Ziŝou kaj aliaj instruistoj helpi s-ron Li fondi la grupon.

La unua malfacilo, kiun ili frontis, estis aĉeti longajn flutojn, ĉar ili estis tre multekostaj. Kie akiri la monon?

Li Ŝjueĉjŭan decidis viziti la Pekinan Fabrikon de Blovinstrumentoj por hazarda ŝanco. Post kiam li diris sian intencon al vicestro Sun, tiu ĉi estis forte kortuŝita de lia sindonemo. Li firme premis lian manon, dirante: "Kiel fama muzikisto, vi voluntas dediĉi vian energion al kulturado de la juna generacio de flutistoj. Kion ni povus diri? Kompreneble, ni devas tutforte subteni vin. . ."

La fabriko decidis senpage liveri al la geknaboj 10 tiajn flutojn. La tasko estis urĝa kaj peza, tial laboristoj rezignis siajn libertagojn por fari la flutojn.

En la 9-a de majo 1982 fondiĝis la flutluda grupo. Ĝian inaŭguron ĉeestis gvidantoj de profesiaj muzikaj trupoj, famaj direktistoj, komponistoj, flutistoj kaj multaj muzik-amantoj el diversaj postenoj. En la halo de la domo regis varma atmosfero, kaj tie eklernis flutadon 12 geknaboj kiel la unuaj grupanoj, kiuj estis akceptitaj post ekzameno. Ili portis ruĝan tukon ĉirkaŭ la kolo kaj longe ne povis kvietigi sian emociion.

La geknaboj havis la aĝon de 7-12 jaroj kaj devenis de malsamaj lernejoj kaj familioj. La plejparto de ili ne konis la liniaron, tial ili devis lerni ĝin de la komenco.

Depost la fondiĝo de la grupo Li Ŝjueĉjŭan ne plu havis libertempon. Frumatene de dimanĉo li devis bicikli al la geknaba domo ĉu en varmega somero, ĉu en frosta vintro.

La instruado komenciĝis de muziknotoj kaj rudimenta ludar-

to. Li aplikis variajn metodojn rilate la geknabojn kun malsamaj aĝoj kaj muzikniveletoj. La fundamenta trejnado estis rigora. Samtempe li elektis laŭeble interesajn, viglajn muzikpecojn por veki ŝaton de la geknaboj. Li propramane kopiis por ili la muziknotojn kaj aĉetis 12 kajerojn, por ke ili faru hejmtaskojn kaj notu la lernitaĵojn. Krome, li ĝustatempe kontaktiĝis kun iliaj gepatroj por kune kontroli ilian lernadon.

Tiu bagatela kaj malfacila tasko postulis de li profundan amon kaj grandan paciencon. Iuj knaboj estis tre petolemaj kaj moviĝemaj, dum iuj knabinoj emis plori, kiam ili renkontis malfacilojn kaj ricevis kritikon. Kiom da energio li devis pagi por enkonduki ilin en la muzikan pordon.

Kutime, en la difinita tempo antaŭ la someraj kaj vintraj ferioj la geknaba domo estas fermita. Por daŭrigi la instruadon, li invitis la lernantojn al sia malgranda hejmo.


La edzino de Li Ŝjueĉjŭan estis pianistino. Ankaŭ ilia solfilo lernis flutadon kaj sin preparis por la ekzameno enira al konservatorio. En la komenco la edzino plendis, ke tiu kromlaboro difektos la sanon de la edzo kaj forrabas de li multe da tempo kulturi la filon, kaj en lia tagordo mankas loko de la familio. Li pacience klarigis la signifon de tiu laboro kaj fine ricevis indulgemon de la edzino. Kiam la edzino ricevis operacion en hospitalo, li, unuflanke, bone aranĝis dommas-trumadon kaj, aliflanke, kiel kutime donis lecionon al la geknaboj.

Lian energian laboron rekom-pencas la rapida progreso de la geknaboj. Krom ĉinaj muzikaĵoj, ili povas ludi ankaŭ "Menueto

en G-Maĵora" de Betoveno, "Andanto en C-Maĵora" de Mozarto, la interludon de "Carmen" de Bizet kaj aliajn fremdlandajn verkojn.

En la pasinta somero ili okazigis malgrandan koncerton kaj invitis al ĝi siajn gepatrojn, muzikistojn kaj respondeculojn de la fabriko de blovinstrumentoj. La ĉeestantoj multe laŭdis ilian bonegan ludon. Iu el la gepatroj diris: "La aplaŭdo ne nur konfirmas la sukcesojn akiritajn de la geknaboj, sed ankaŭ esprimas korajn dankojn al instruisto Li Ŝjueĉjŭan pro lia sindonemo al la geknaboj!" Vicestro Sun diris: "Ni devas disvolvi tian senegoisman spiriton dediĉi ĉion por la infanoj, por ke la mondo havu pli belan morgaŭon. . ."

Pasis unu jaro. Antaŭ nelonge mi vizitis la provludejon de la Pekina Geknaba Domo. Tie iu knabo ludis fluton sub la gvido de Li Ŝjueĉjŭan kaj aŭdiĝis ĉie tra la ĉambro agrabla melodio. La instruisto refoje ludis la muzikpecon kaj poste diris al la knabo: "Tiu muzikaĵo priskribas flugadon de birdeto. Aŭskultu, ĝi etendas siajnflugilojn, flugas al la blua ĉielo, al malproksimo, flugas, flugas. . ."



La Pekin-opero *"Verda Majo"*

Fotoj de BAJ HŪA



Verda Majo en la opero





La unua sceno: Liŭ Jen kaj Verda Majo renkontiĝas en Ueno-parko en Tokio.



Liŭ Jen en la opero

La kvara sceno: Verda Majo elpelata el Kantono






La sesa sceno: Estrino de kontraŭjapana gerila taĉmento intervidiĝas kun Verda Majo.



Flutisto Li Ŝjueĉĵuan instruas geknabojn.



SINDONEMA

FLUTISTO

Fotoj de ĈJU ŬEJBO.



La oka sceno: Verda Majo malkaŝas krimagojn de militaristoj.



Li Ŝjūcǎijūan inter geknaboj de la amatora flutluda grupo




Prezentado

**Knabinoj skribas
kion la instruisto
diktas.**



En leciono





Matena kurado

FENG KEŬEJ:

Familio de sport-amatoroj

“SPORTO alportas grandan ŝojon al mia familio,” diris 38-jara Hu Najjing, kiam mi vizitis lin. Li estas laboristo de la Pekina Radio-fabriko. Li rakontis al mi pri la interesa sporta vivo de sia familio.

Ĉiumatene je la sesa eksonoras vekhorloĝo. Tuj ellitiĝas la tuta familio. Poste Hu Najjing kaj lia 11-jara filino kuras 4 000 metrojn laŭ strato, kaj liaj edzino kaj 7-jara filo 2 000 metrojn laŭ strateto. Fininte la kuradon, la edzino preparas matenmanĝon kaj Hu Najjing trejnas siajn gefilojn. La filino sin ekzercas en alta levado de la gamboj kaj farado de grandaj paŝoj antaŭen por mezdistanca kaj longdistanca kuro, kaj la filo en haltigo kaj transigo de piedpilko... Post matenmanĝo Hu Najjing kaj lia


edzino biciklas al laboro kaj la gefiloj vizitas lernejon.

Reveninte hejmen posttagmeze, la gepatroj sin okupas pri domlaboroj kaj la gefiloj faras hejmtaskon. Post kiam ili vespermanĝas, ili kvarope promenas sur strato. Hu Najjing ŝatas ludi ŝakon kun sia filo post la promonado, kaj la edzino kaj filino ĉiam estas fervoraj spektantoj. Antaŭ ol enlitiĝi la gefiloj konkurse faras “kuŝiĝo-sidiĝon” kaj “korpolevon per manoj”, kaj la gepatroj servas kiel iliaj juĝistoj. Kompreneble, ĉiufoje la filino gajnas la ludon, kaj la filo paŭtas, murmurante: “Se mi estus 4 jarojn pli aĝa ol la fratino, mi certe superus ŝin!” Poste la gepatroj faras masaĝadon al la gefiloj, dank’ al kio la lastaj dronas en dolĉa dormo.

Ilia familio estas plena de vikleco kaj gajeco, kion multaj envias al ĝi. Tamen antaŭ dek jaroj en ilia familio ne regis tiel agrabla atmosfero.

Tiam Hu Najjing suferis kronikan nefriton. Pri tio la edzino estis tre maltrankvila kaj devis akompani lin al diversaj lokoj por viziti kuracistojn. Tio multe lacigis ŝin.

Iun tagon Hu Najjing legis raporton en la gazeto «Sporto», ke iu suferanto de kronika malsano persistis en sporta ekzercado kaj resaniĝis. El tio li ekkomprenis: “Por resanigi min mi devas fari ankaŭ regulan sportan ekzercadon, krom preni medikamenton.” Li diris la ideon al sia edzino, kaj ŝi helpis lin ellabori planon por prove fari sportan ekzercadon. Tiel komenciĝis lia “fizioterapio”. En la komenco li ĉiutage



La gefratoj amantaj piedpilkan ludon

faris nur promenadon kaj poste kuris je 200, 400, 1 000, 2 000 metroj . . . Pasis jam du jaroj. Hu Najjing iom post iom fariĝis fortika kaj energioplena.

Li multe profitis el la sporta ekzercado kaj decidis partopreni ĉiujn siajn familianojn en tiu aktivado. Li diris al mi: "Mi jam ĝuis bonojn donitajn de sporto kaj esperas, ke la tuta familio amos sporton. Mi unue konvinkis la edzinon kaj poste la gefilojn."

Longtempa sporta ekzercado donis konvinkan efikon al la tuta familio de Hu Najjing. En la lastaj ses jaroj Hu Najjing neniam petis forpermeson pro malsano. Li servas kiel planisto de la modelila laborejo kaj ĉin-lingva

instruisto de la kurso de elementmezlernejaj lecionoj. Li estas tre okupita. Ĉiufoje, kiam oni demandas, kial li estas tiom energioplenta, li fiere respondas: "Kompreneble, tio ŝuldas longdaŭran sportan ekzercadon."

U Mejŝja, edzino de Hu Najjing, estas ĉ. 40 jara. Dank' al ĉiutaga sporta ekzercado, ŝia korpo ne nur malpeziĝis, sed ankaŭ fariĝis multe pli facilmovala. En la pasintjara Printempa Festo ŝi gajnis la kvaran lokon de la virina surkampa kuro okazigita de la Pekina Instrumenta Buroo.

Ilia filino, lernanto de la kvina klaso de elementa lernejo, estis elektita kiel lernanto bona en moralo, lerno kaj korpokul-

turo en sinsekvaj jaroj. Ŝi estas ankaŭ membro de la naĝista grupo de la kvartala postleciono sporta lernejo. En la kvartala element-lernejana sportkunveno ĉi-jare ŝi gajnis ĉampionecon de 800-metra kuro.

Ilia filo, lernanto de la unua klaso de elementa lernejo, tre ŝatas piedpilkan kaj eluzis jam 10 pilkojn. Li estas ankaŭ ŝakludanto de la Pekina Geknaba Domo. Li aĝas nur sep jarojn, tamen li altas jam 1.38 metrojn kaj pezas 40 kilogramojn. Liaj pulma volumeno kaj pugnoforto multe superas tiujn de samaĝaj infanoj. La gepatroj de la aliaj lernejoj kaj ĉiuj instruistoj admiras lian altan staturon.

En februaro ĉi-jare la Federacio de la Ĉina Tutlanda Korpokulturo kaj la redakcio de la revuo "Nova Sporto" elektis 295 "modelajn familiojn de sportamatoroj", inter kiuj estas tiu de Hu Najjing.

Nun en Ĉinio pli kaj pli multiĝas tiaj familioj. Frumatene, ĉie, ĉu ambaŭflanke de stratoj kaj en parkoj de urboj, ĉu sur liberaj spacoj de urbetoj kaj vilaĝoj, videblas geedzoj kurantaj, gefratoj ludantaj pilkon, avo kaj nepo gimnastantaj. Laŭ statistiko de la Komisiono de Korpokulturo kaj Sporto de Ĉinio, nun en Ĉinio estas pli ol 100 milionoj da loĝantoj, kiuj ofte faras sportan ekzercadon.

Kiam mi adiaŭis la mastron de la "familio de sportamatoroj", li kun emociiĝo diris: "Familio estas ĉelo de la socio. Oni pasigas pliparton de la postlaboraj horoj en la hejmo. La familia sporta ekzercado ne nur sanigas ilin, sed ankaŭ faras la familian vivon pli vigla kaj la familion pli nobla.

LIŬ ŜJANPING:

Gasti en hejmloko de grandaj pandoj

EN malfrua printempo de la pasinta jaro mi kaj inĝeniero Hu Tjeĉing kontraŭvole forlasis la montan kampadejon 2 500 metrojn super la marnivelo de la Monda Esplor-centro pri Protektado de Grandaj Pandoj en Ŭolong-rezervejo, Siĉŭan-provinco. Ĉe la adiaŭo profesoro Hu Ĝinĉu diris al mi kun ĝojo:

“Dank’ al la pli-ol-unu-monata radia spurado, observado kaj analizo pri la donitaĵoj, ni povas konkludi, ke la granda pando Ĝenĝen jam gravediĝis. Vi revizitu nian rezervejon aŭtune kaj ni kune festu la unuan plenmonaton de ĝia infano, la unua pando en nia esplor-centro.

Realigis la antaŭdiro de profesoro Hu. Oktobre mi ricevis ĝojigan leteron de inĝeniero Hu: La radia spurado kaj observado konstatis, ke la granda pando kaptita, kiu gravediĝis post la liberiĝo, abrupte reduktis sian aktivadon kaj agadkampon, kio povas fundamente certigi, ke ĝi naskis bebon. La letero urĝis min rapidi tien.

Mi ne scias, kiom da homoj interesiĝas pri tiu informo, sed mi povas diri kun nenia troigo, ke tio estas la unuafoja esplorado kaj observado per modernaj sciencaj metodoj en la mondo, al granda pando, la tiel nomata viva fosilio, en nasko kaj nutrado de la ido en sovaĝejo. Tio havis gravan sciencan signifon por protekti la rarajn grandajn pandojn, kiuj alfrontas pereon.

Komence de novembro mi

atingis la hejmlokon de grandaj pandoj.

Matene, furiozis malvarma vento, pro kio la profundaj arbaroj kaj montvalo fariĝis pli dezertaj. Sekvante Hu Ĝinĉu, mi kaj redaktoro de la revuo “La Naturo” Tang Ŝijiang prenis la vojon viziti Ĝenĝen kaj ĝian novnaskiton.

Survoje profesoro Hu malofte parolis escepte de necesaj klarigoj. Malmulte demandis mi kaj ankaŭ Tang, ĉar la observado de sovaĝaj animaloj tion malpermesas. Profesoro Hu sagace rigardis per siaj ĉasistaj okuloj kaj palpis jen arbeton, jen bambuon per siaj dikaj manoj.

Por ni estis bone konate ke en la 2 000-kvadratkilometra regiono, 52 kilometrojn longa kaj 62 kilometrojn larĝa, kun neĝkovritaj montoj, herbejoj kaj montvaloj vivas multspecaj animaloj. Ĝuste pro tio la internacia biosfero de UNO difinis ĝin kiel rezervejon. Kompreneble estis neeble por ni esplori ĉiun kuriozaĵon kaj pririgardi ĉiun pitoreskejon. Atendis nin pli grava tasko, viziti la “vilaon” de la granda pando Ĝenĝen.

“Se la granda pando sin kaŝas kaj ne volas nin akcepti?” mi pensis en mi kaj demandis:

“Ĉu ni certe vidos ilin?”

“Sen eksterordinara ĝeno la grandaj pandoj ne transloĝiĝas en sia mamnutra periodo. En la lastaj monatoj ĝi ja vivis en tiu ĉi loko. Kaj krome, dank’ al la radia



spurado ni povas facile scii ĝian loĝlokon. Sed ĉu ĝi akceptos vin hodiaŭ? Ĉu ĝi vin akceptas pace aŭ milite, tio dependas de ĝia humoro, medio kaj aliaj. . .”

Aŭdinte tion, mi kaj Tang eksplodis de ridego. Ni ambaŭ estas ne tute senspertaj en natura observado, sed la serioza profesoro Hu ruze palpebrumis dirante:

“Ĉu vi opinias, ke mi trompas vin? Ĉu? Atendu!”

Doktoro Shirer el la Monda Fonduso por Protekti Sovaĝajn Vivaĵojn gajnis unuvoĉan laŭdon de la ĉinaj kolegoj per sia diligenteco kaj maltimo de laciĝo en la komuna esplora laboro. Post kelka tempo da laboro li kun plena estimo laŭdis la erudicion de profesoro Hu, ĉina vicgrupestro de la fakuloj: “Mi lernis multe de la profesoro.”

La grandaj pandoj estas kuriozaj bestoj ekzistantaj sole en Ĉinio. La Monda Fonduso por Protekti Sovaĝajn Vivaĵojn prenis ĝian figuron kiel sian emblemon. La grandaj pandoj vivis en la plejstoceno antaŭ ĉirkaŭ

600 000 jaroj. La elterigitaj fosilioj montris, ke la grandaj pandoj estis grandnombraj en la meza plejstoceno, t.e. en la periodo de la pekinaj simihomoj. Tiam ilia faŭno okupis regantan pozicion kune kun stegodonoj (*Ang. stegodon*). Eĉ antaŭ 2 000 jaroj ili aktivadis ĉe la loko proksima al la nuna urbo Ŝji'an, Ŝenŝji-provinco. En la antikvaj ĉinaj libroj legeblas priskribo pri ĝiaj vivkutimoj. Kun la tempopaso ili estis alpremitaj al malvastaj zonoj, en kelkaj negrandaj lokoj. Nur en 1869, post kiam franca misiisto David aĉetis pandan felon en Baŭŝjing-gubernio, Siĉŭan-provinco, la grandaj pandoj estis konataj internacie kaj allogis plurajn esploristajn grupojn eksterlandajn al la okcidenta Siĉŭan. Ili verkis multe pri la bestoj. Post sekado de granda pando oni verkis eĉ dikan libron.

Komence de la sesdekaj jaroj Ĉinio starigis la unuajn rezervejojn de grandaj pandoj, inkluzive tiun de Ŭolong, kion persone entreprenis inĝeniero Hu Tjeĉing. Ĝuste de tiam komenciĝis la amikeco inter li kaj profesoro Hu. Ili ambaŭ finis sian universitatan studon en la 50-aj jaroj, sed ilia grandskala esplorado pri la grandaj pandoj komenciĝis de la 70-aj jaroj. Gvidate de la provinca forst-administracio ilia esplorista grupo postlasis siajn piedsignojn ĉie en la provinco Siĉŭan. Iu el la membroj de la esplorista grupo diris, ke ili spertis suferojn, kiujn la aliaj ne spertis, sed rekompence ili propraokule vidis belajn pejzaĝojn, kiujn tiuj ne vidis. En pluraj jaroj, ili piediris 45 000 kilometrojn kaj fine sciigis pri la dislokiĝo kaj la nombro de la bestoj kaj ties vivkutimo. La protokolo saturita de diligenta laboro de la esploristoj gajnis premion en la tutlanda simpozio.

La rezervejo troviĝas sur ne tre vasta ŝtupara montaro 2 500 metrojn super la marnivelo, kie kreskas cugoj (*Tsuga chinensis*) kaj abioj, sub la arboj sporade floras rododendroj, dume prosperas bambuoj. Ĝuste en tiu ĉi verda maro vivas la grandaj pandoj.

Montrante al ni grataĵojn sur abioj, far grandaj pandoj kaj iliajn aliajn postsignojn profesoro Hu rakontis al ni komedion tie okazintan.

La kuna esplorado pri la grandaj pandoj komenciĝis de la pasinta januaro. Laŭ plano oni devis unue esplori la vivadon de pandoj. La grandaj pandoj, kiujn profesoro Hu ŝerce nomis "ermitoj", vivas en bambuaroj sur altaj montoj. Kutime ili vivas unuope, tial en la montoj oni vidas ilin tre malofte. Kvankam la esplorista grupo jam fundamente konis ilian vivkutimon post plurjara observado, tamen por fari pli profundan esploron, ekz. tiun pri ilia generado, oni devis alpreni novajn rimedojn.

Dum multaj jaroj la generado de grandaj pandoj restis mistero kaj inter la ĉasistoj cirkulis diversaj asertoj kontraŭdiraj unu al alia kaj tute nekredeblaj. Estas ja ne strange, ke pro ĝia fiziologia aparteco iuj eksterlandaj esploristoj konfuziĝis en diferencigo de iliaj seksoj. En 1936 la esplorista grupo gvidata de Rose Hacknas kaptis junan grandan pandon en la montaro Ĉjonglaj, Siĉŭan-provinco. Preninte ĝin femala, la esploristoj kunportis ĝin al San-Francisko. En la sekvanta jaro Rose Hacknas, la aŭtoro de "Virino kaj Pando" refoje veturis al Siĉŭan kun aparta celo kaj forportis alian pandon por ke tiu pariĝu kun la unua. Sed tute ekster lia atendo,

la unua pando estis maskla. En 1941 Usono opiniis, ke ĝi akiris paron da grandaj pandoj, sed la faktoj montris poste, ke ili estis fratinoj! Kiel ridinde estis!

Ju pli mistera estas la afero, ĝi vekas des pli fortan entuziasmon de la sciencistoj por malkaŝi ĝian sekreton, kompreneble, ne pro scivolemo. Sur la mapo pri la dislokiĝo de grandaj pandoj oni trovas, ke ili vivas en lokoj disigitaj de altaj montoj kaj profundaj valoj, kvazaŭ sur insuloj. Ilia generado estas malrapida, ili estas malfortaj en la vivkonkurado, plus la damaĝo de la ekologia ekvilibro, ĉio ĉi puŝas ilin en krizon. Tial estas ekstreme grave por ni protekti tiujn naciajn trezorojn kaj studi pri ilia vivo kaj generado.

Por solvi la malfacilojn en spurado de sovaĝaj grandaj bestoj oni devis fiksi al ili radiotelegrafon. Tiel la en- kaj eksterlandaj fakuloj metis sian atenton sur kaptan de grandaj pandoj.

Baldaŭ venis marto kaj en la tendo jam aŭdiĝis voko de grandaj pandoj. Tie tamen nenion kaptis la kaptiloj aranĝitaj de la fakuloj. En maltrankvilo kaj malsukceso ili pasigis tagon post tago. Dank' al la aplombo de profesoro Hu kaj pena laboro de la fakuloj ĉinaj kaj alilandaj, oni fine kaptis tri grandajn pandojn respektive en la 10-a kaj 20-a de marto kaj la 18-a aprilo. La sciencistoj faris al ili korpoekzamenon, fiksas al ili radiotelegrafon kaj lasis ilin al la sovaĝejo.

Inter tiuj tri nur tiu kaptita la 20-an de marto estis matura femalo. Oni nomis ĝin Ĝenĝen. La ceteraj du estis ja junaj 2-3-jaraj, tial oni donis al Ĝenĝen

Kajtisto

Ha en

Usono



Ha Jiĉji montras flagan kajton al usonaj kajtamantoj.

LA 19-an de junio 1985 estis brila suno kaj milda vento. Sur la Merina Placo en San-Fran-

cisko kolektiĝis gajaj homamasoj. Je la unua posttagmeze, en agrabla muziko leviĝis al la lazura

ĉielo du kajtoj delikate faritaj respektive el ĉina kaj usona naciaj flagoj. Ilin akompanis granda

apartan atenton kaj metis sur ĝin grandan esperon.

La radia spurado montris, ke la liberigita Ĝenĝen iris ne malproksimen. Ĝi daŭre aktivadis proksime.

La spuroj de Ĝenĝen estis desegnitaj sur grafikaĵo. La 11-an de aprilo ĝi vagadis en valo. Vespere de tiu tago aŭdiĝis blekoj de granda pando ĉe proksima monteĝo. Tiu eksterordinara fenomeno tuj vekis atenton de la fakuloj kaj ili decidis ĝin gvati strikte. En la sekvanta tago la besto daŭre kriis en proksimo. Ĝi eĉ grimpis arbon por rigardi foren. La trian tagon, la forta informo de la radia telegrafo kaj eksterordinara aktivado aŭguris al ni la ĝojigan fenomenon. La sciencistoj direktis sin tien, kie estis la pandoj, kaj vidis kiel la

virbestoj amindumis kaj luktis por amo.

Tempo: Ĉirkaŭ la tria pm, kiam la suno kliniĝis okcidenten kaj arboj ŝetis siajn densajn ombrojn teren.


Loko: Ĝuste tie, kie densis verdaj folioj kaj burĝonis floroj.

Aktoroj: Paro da virpandoj, unu granda kaj unu malgranda, foj-foje amindumis Ĝenĝen, kiu kun mikro-telegrafo ĉe la kolo fiere staris apude, kaj ŝetis konstante koketajn rigardojn al la paro da amindumantoj.

Nun la fakuloj propraokule vidis la amaferon de grandaj pandoj en sovaĝejo, kio estis ĝojiga kompenso al ilia diligenta laboro. En treege rara okazo ili tuj prenis ĉiujn necesajn instrumentojn por foti, registri sonon ktp.

Daŭris la intrigo. Unue la du "ĝentlemanoj" konkuris por amo de la pandino-nobelino nur per amindumo, sed poste la konkuro disvolviĝis en luktadon. Ĝenerale dirite, la grandaj pandoj ĉiam plaĉas al la rigardantoj per sia ridinda stultaĵo, eĉ kiam ili ekscitiĝas de ĵaluzo, al ili ne mankas bonkoreco. Por kunulino ili neniam arope sin ŝetis en luktadon samkiel vircervoj, kiuj ofte kaŭzas sangadon kaj iam eĉ morton en la batalo. Ili rigardis kolere unu la alian, muĝis kaj afekte sturmis unu la alian. La impona kolosa pando muĝis obtuze kvazaŭ bovo, dum la magra kaj nana pando blekis laŭte kaj akute kvazaŭ hundo. Kiam ardiĝis la batalo, ilia muĝado tremiĝis la tutan valon. Jen konkuro konsumanta fortojn, duelo pri la volo. Ambaŭ luktantoj anhelis.

(Daŭrigo sur p. 29)



Ha Jiêji (maldekstre) en la Usona Kajta Asocio

kajto kun slogano, sur kiu estis skribita: "Bonvenon al majstro Ha en San-Francisko!" Kun la leviĝo de la kajtoj eksplodis varma aplaŭdo de la spektantoj. Tie iris internacia kajtokonkurso.

Juna ĉino, kiu flugigis naciflagan kajton sur la placo, estis atentata de la spektantoj. Li estas Ha Jiêji, ĉina kajtisto-majstro, speciale invitita al la konkurso.

La 29-jara Ha Jiêji fariĝis sensacia persono, tuj kiam li surteriĝis en Usono je la majfino. Reportistoj de pli ol 30 ĵurnaloj, radio-stacioj kaj TV-stacioj lin intervjuis unu post alia, dum sep tagoj. Tiam en ĵurnaloj, sur ekrano de TV aperadis raportaĵoj pri ĉina kajtarto kaj tiu ĉina kajto-specialisto, kaj tiel estiĝis "manio por ĉinaj kajtoj".

Ha Jiêji venis al San-Francisko kiel gasto de la Ekspozicio de Ĉinaj Kajtoj, sen intenco partopreni la konkurson. Sed kajtamantoj el Japanio, Francio, Kanado kaj Usono jam delonge konas la nomon de la grandfama kajtisto, tial ili sincere invitis lin demonstri kajtfaradon kaj kajtflu-

gigon en la konkursejo. Por kontentigi ilian deziron, Ha Jiêji faris du belajn kaj brilkolorajn kajtojn, kiuj havis tradiciajn trajtojn de Ha-tipa kajto. El ili unu estas en formo de hirundo kaj la alia en tiu de fiŝo. La hirundo longas 5 metrojn. Sur ĝi estis pentritaj kvin ruĝaj orfiŝoj en verdaj ondoj, kun dek okuloj libere turniĝantaj kontraŭ vento. La fiŝo estis giganto konsistanta el pli ol cent partoj kun longeco de 40 metroj, kiu ŝvebas en la ĉielo kvazaŭ kolosa drako. La prezentado de Ha Jiêji ricevis varman aplaŭdon de la ravitaj spektatoroj. La prezidanto de la Usona Kajta Asocio deiris de la podio kaj kun starigita dikfingro diris al Ha: "Ĉina kajto estas vere unuaranga." Post la konkurso la prezidanto invitis lin disdoni premiojn al la elstaraj konkursantoj kaj samtempe donis al li specialan premion pro lia kontribuo al la kajtarto.

En Ĉinio la kajtarto havas longan historion. Historiaj notoj diras, ke 500 jarojn antaŭ Kristo vivis en Ĉinio majstro Gongŝu Ban, kiu elfaris la unuan kajton,

kaj ekde tiam la kajtarto ekcirkulis en la ĉina popolo. Delonge Pekino estas unu el la plej floraj regionoj de kajtarto. Ha Jiêji naskiĝis en kajtista familio. Oni humure nomas lian familion "Ha-kajto".

Jam kvar sinsekvaj generacioj de Ha-familio okupiĝis pri kajtfarado. La praavo de Ha Jiêji gajnis premion en la Internacia Foiro en San-Francisko en 1915 per siaj kvar kajtoj kaj tiam tuj famiĝis Ha-tipa kajto. Neatendite, en la Ekspozicio de Ĉinaj Kajtoj Ha Jiêji trovis kvar kajtojn faritajn de lia praavo en la komenco de la kuranta jarcento, kiuj en formoj de lotusfloro kaj kalabaso, incensujo, fantomkaptanto Ĝongkuj kaj fiŝo-paro estis konservataj preskaŭ 70 jarojn en la San-Franciska Muzeo.

Dum sia restado en Usono Ha Jiêji, invitate de la Usona Kajta Asocio, okazigis kvin kursojn pri la ĉina kajto, en kiuj li prelegis pri la historio de la ĉina kajto kaj ĝiaj specoj, projektado kaj farado. Sian metiarton li instruis al tiuj kajtamantoj. Ĉe la fino de la kursoj ĉiuj estis ekster si de ĝojo vidante sian kajton, faritan sub la gvido de Ha Jiêji, ŝvebanta en la blua ĉielo. Por esprimi sian koran dankon al Ha Jiêji, ili sin fotis kune kun li kaj kun sia kara kajto en la manoj.

Ha Jiêji nelonge restis en Usono kaj jam revenis en Pekinon. Li neniam forgesos la amikecon inter li kaj alilandaj popoloj starigitan pere de tiu antikva popolaro. Nun li jam fariĝis vicestro de la Pekina Kajta Eksperimenta Fabriko. Li kune kun sia patro Ha Mingkuj verkas la libron "Ha-tipaj Kajtoj". Li diris: "Ni prezentos kiel eble plej baldaŭ tiun libron al la kajtamantoj de diversaj landoj."

La unuigo fare de Ĵuan-dinastio

de BA HONG



Portreto de Kublajo

LEVIĜO DE LA MONGOLOJ

La mongoloj estas antikva nacimalplimulto en la nordo de Ĉinio, kiu antaŭe loĝis oriente de la rivero Ergune kaj poste disloĝis sur la vasta Mongola Altebenaĵo. Ĝi havis multajn tribojn, kiuj plejparte vivis kiel nomadoj. Tage ili paŝtis bovojn, ŝafojn, ĉevalojn kaj kamelojn sur la stepoj kaj nokte loĝis en feltaj jurtoj. Malmultaj el ili sin okupis pri ĉasado en arbaroj.

En la 12-a jarcento la mongoloj ankoraŭ vivis en la sklava socio. La nobeloj posedis grandan kvanton da brutoj kaj sklavoj. Ili devigis siajn sklavojn bredi brutojn, tondi ŝaflanojn, melki, fari ledojn, feltojn kaj

aliajn laborojn. La mongoloj interŝanĝis kun la hanoj silkaĵojn, feraĵojn kaj aliajn objektojn kontraŭ ĉevaloj, ledoj kaj lanoj.

De la fino de la 12-a jarcento ĝis la komenco de la 13-a jarcento, Temuĝin konkeris la aliajn mongolajn tribojn kaj fondis unuigitan Mongolan Ĥanan Regnon. Per tio li puŝis la mongolan historion al nova etapo. En 1206 Temuĝin kunvokis ĉe Ŭonan-rivero (la nuna Enen-rivero) kunvenon de la tribestroj kaj estis elektita kiel granda ĥano de la tuta Mongolio kun la titolo Ĝingis-Ĥano. La ĉinaj historiistoj nomis lin Tajzu de Ĵuan-dinastio.


Ĝingis-Ĥano kaj la daŭriganroj de lia afero Ŭokŭotaj-Ĥano

kaj Menggo-Ĥano faris longdaŭran militon al la sudo kaj okcidento. La suden-militiro kontraŭ Ŝja, Ĝin kaj Song okazis en Ĉinio, dum la okcidenten-militiro etendiĝis de Ĉinio ĝis centra Eŭropo.

La venkoj en la okcidenten-militiro gajnitaj de la mongoloj ebligis al ili fondi kvar ĥanajn regnojn, kiuj ĉiuj dependis de la Mongola Ĥana Regno, kaj poste sendependiĝis unu post alia. Ili pereis inter la 14-a kaj 15-a jarcentoj.

La mongoloj pereigis la Okcidentan Ŝja en 1227 kaj Ĝin en 1234. La mongolaj rajdistoj faris ĉie bruligon, prirabon kaj masakron, kio kaŭzis al la popolo tre grandan malfeliĉon. Kiam Ŭokŭotaj estis en trono, iu el liaj intimaj korteganoj proponis, ke oni ŝanĝu la agrojn de la hanoj en paŝtejojn, ĉar la hanoj estas senutilaj al la regno. Sed la kortegano Jeljuĉuĉaj havis malsaman opinion. Li diris, ke la hanoj povas pagi al la ŝtato multan imposton, kiu povas servi kiel provianto de la armeo dum la suden-militirado. Lia propono estis akceptita, tial la vasta suda regiono evitis ruinigon. Jeljuĉuĉaj (1190-1244) estis ĉidan-ano. Li estis erudicia politikisto dum la regado de Ĝingis-Ĥano kaj Ŭokŭotaj-Ĥano. Li instigis la mongolan regantaron akcepti la kulturon de la hanoj.

Pereiginte Ĝin-regnon, la mongoloj direktis sian lancopinton al



Pentraĵo pri laboro de popolanoj de Jŭan-dinastio

la Suda Song-dinastio. En 1260 Kublajo fariĝis granda ĥano kaj en 1271 nomis sian ŝtaton Jŭan. Li estis imperiestro Ŝizu de Jŭan-dinastio. En 1276 la armeo de Jŭan-dinastio pereigis la Sudan Song-dinastion kaj de tiam la socio, al kiu frontis la mongola nacieco, eniris en la feŭdan.

La fondiĝo de Jŭan-dinastio akcelis la disvolviĝon de nia multnacieca lando kaj la kunfandiĝon de la diversaj naciecoj.

LA SOCIO KAJ EKONOMIO DE JŬAN-DINASTIO

La ĉefurbo Dadu (la nuna Pekino) estis la centro de ekonomio kaj kulturo de Jŭan-dinastio. En sia verko "La Vojaĝoj de

Marko Polo", la aŭtoro, kiu siatempe oficistiĝis en Jŭan-dinastio, diris: "La loĝantoj de Dadu estas riĉaj", "la merkatoj estas plenaj de diversaj varoj, ĉiutage pli ol mil ĉaroj da silkaĵoj portiĝas en la urbon", "neniu el la mondfamaj urboj povas esti komparata kun ĝi en importado de multekostaj raraĵoj kaj diversaj varoj".

Marko Polo (1254-1324) naskiĝis en la urbo Venecio de Italio. Li venis al Ĉinio en la aĝo de 17 jaroj kun siaj patro kaj onklo kaj atingis Dadu en la aĝo de 21 jaroj. Li estis admirata de Kublajo pro siaj saĝo kaj talento. Dum la 17 jaroj, kiam li restis en Ĉinio, li plurfoje veturis al

aliaj landoj kiel sendito de Jŭan-dinastio. Reveninte sian patrolandon, li diktis la mondfaman "La Vojaĝoj de Marko Polo", en kiu li admiris la riĉecon, civilizacion kaj prosperon de Ĉinio kaj la Oriento. La verko siatempe sensaciis en Eŭropo.

Jŭan-dinastio havis facilegan trafikon. Por intensigi la rilaton inter la ĉefurbo kaj la provincoj la ŝtato starigis pli ol 1 300 akvo-kaj ter-vojjajn etapajn staciojn sur la trafikaj linioj de la tuta lando, kiuj liveras al turistoj ĉevalojn, bovojn, ĉarojn kaj ŝipojn. Kiuj permesitaj iri etapajn vojojn "povas ripozi kaj manĝi en gastejoj survoje". Kublajo plenumis grandan akvo-trafikan projekton, t.e. konstruigi la Grandan Kanelon de Hangĝoŭ en la sudo ĝis Dadu, rektigi la vojlinion de la kanalo, kiu trapasis Henan-provincon, por ke ĝi tra Ŝandong-provinco rekte atingu la ĉefurbon Dadu. Li ankaŭ malfermis surmaran linion de la sudoriento ĝis Dadu, kiu komenciĝis de Ljuĝjahaveno (la nuna Ljuhe de Tajcang-gubernio de Ĝjangsu-provinco) ĉe la buŝo de Jangzi-rivero, tra la Flava Maro, Bohajmaro kaj Ĝigu (la nuna Tjanĝin), kaj finiĝis en Dadu. En favora vento la ŝipoj povis atingi la ĉefurbon post dekelko da tagoj.

La tiamaj Dadu, Hangĝoŭ, Ĉjŭanĝoŭ kaj Kantono ĉiuj estis mondfamaj urbegoj. Ĉjŭanĝoŭ estis la plej granda havenurbo de Ĉinio en ekstera komerco, kaj tie ofte ankriĝis pli ol 15 000 marŝipoj. Eksterlandaj komercistoj prenis ĝin kiel unu el la komercaj centroj de la mondo. La pagodo Ljuŝeng, kiu tiam funkciis kiel lumturo, nun ankoraŭ staras en Ĉjŭanĝoŭ.

La ekstera komerco de Jŭan-dinastio etendiĝis ĝis Koreio kaj

Japanio en la oriento, Hindio kaj diversaj lokoj de la sudorienta Azio en la sudo, Arabio kaj la orienta parto de Mediteraneo en la sudokcidento kaj Afriko en la okcidento.

PEREO DE JŪAN-DINASTIO

Jŭan-registaro peze impostis la terkulturadon al la kamparanoj. La nobeloj, burokratoj, grandaj bienuloj kaj temploj posedis grandan kvanton da agroj. La bienuloj senĉese altigis terentojn, servis al si farmulojn kaj iliajn gefilojn, iuj eĉ vendis sian bienon kun farmuloj. La mongolaj nobeloj kaj burokratoj rabis grandan nombron da loĝantoj en milito, devigis ilin kulturi iliajn kampojn, fari servuton, doni tributon kaj imposton kaj eĉ vendis ilin kiel brutojn.

Jŭan-registaro subpremis aliajn naciecojn. Ĝi dividis la popolon en kvar klasojn: La mongoloj okupis la plej altan pozicion. La popolanoj de la

okcidentaj naciecoj kaj la Okcidenta Ŝja okupis la duan. La nordaj hanoj, ĉidan-anoj kaj njuĝen-anoj la trian. Kaj la sudaj hanoj kaj la alinaciecaj popolanoj vivis en la socia fundo.


En la lasta periodo de Jŭan-dinastio ofte okazis sanga batalo por krono inter la imperiestraj familianoj. En la pli ol 20 jaroj de 1308 ĝis 1333 sinsekve surtroniĝis ok imperiestroj. Ili senescepte estis senprudentaj, dum la diversnivelaĵoj ŝtatoficistoj senbride faris rekvizicion kaj kolektis riĉaĵojn por si sub diversaj pretekstoj. Subulo devis doni al sia superulo "vizitan monsumon" je la unuafoja vizito, "naskiĝ-tagan monsumon" je lia naskiĝ-datreveno kaj "poŝmonon" en ordinaraĵoj. La disipado de imperiestro estis des pli mirinda. Imperiestro Ĵenzong foruzis 3 900 uncojn da oro por kopie skribi kolekton da budhismaj sutroj kun oraj ideografiaĵoj. Por kovri la ŝtatan deficiton la regis-

taro senbride emisiis monbiletojn, kio kaŭzis inflacion, ĥaoson de la merkatoj kaj profundan mizeron al la popola vivo.

Ekde 1324 sinsekve okazis akrida plago, sekegeco, inundo kaj tertremo. En 1352 pli ol 400 000 malsataj popolanoj ĉirkaŭ la ĉefurbo Dadu almozpetaŭte fuĝis pro sinsekvo da pluvego.

La subpremado de la mongoloj kaj naturaj plagoj puŝis la vastan popolon al pereco. En la lastaj jaroj de Jŭan-dinastio la popolo en la orienta Ĝeĝjang diris indigne: "Alta la ĉielo, malproksimas la imperiestro; malmultas la popolanoj, multas la ŝtatoficistoj; ĉiutage ni trifoje suferas de bato, kion alian ni atendas krom ribelo?" Al la popolo restis nur unu sola vojo — ribelo!

La flagoj de la ribelantoj flirtis tra la tuta lando. Fine la ribelanta armeo gvidata de Ĝu Jŭanĝang renversis la regadon de Jŭan-dinastio kaj fondis Ming-dinastion en 1368.



La libro "La Familiaj Nomoj" en la mongola kaj hana lingvoj



第七课 Sepa Leciono

Ni Estas Esperantistoj

I. vortoj

han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
世界语者 (nomo) ¹	shìjièyǔzhě	esperantisto
喜欢 (verbo)	xǐhuan	ŝati
世界语 (nomo)	Shìjièyǔ	Esperanto
每 (pronomo) ²	měi	ĉiu
天 (nomo)	tiān	tago
读 (verbo)	dú	legi
书 (nomo)	shū	libro
说 (verbo)	shuō	paroli
常常 (adverbo) ³	chángcháng	ofte
高兴 (adjektivo)	gāoxìng	ĝoja
们 (finaĵo) ⁴	men	<i>finaĵo de pluralo</i>
都 (adverbo) ⁵	dōu	ĉiuj

2. teksto

han-lingvo

林红：“你是世界语者吗？”

HFA

Lín Hōng: “Nǐ shì shìjièyǔzhě ma?”

laŭvorta traduko

vi esti esperantisto ĉu

Esp-a traduko

Lin Hong: “Ĉu vi estas esperantisto?”

han-lingvo

安娜：“是。你喜欢世界语吗？”

HFA

Ānnà: “Shì. Nǐ xǐhuan Shìjièyǔ ma?”

laŭvorta traduko

jes vi ŝati Esperanto ĉu

Esp-a traduko

Anna: “Jes. Ĉu vi ŝatas Esperanton?”

han-lingvo

林红：“我喜欢。我每天读世界语书。”

HFA

Lín Hōng: “Wǒ xǐhuan. Wǒ měitiān dú shìjièyǔ-shū.”

laŭvorta traduko

mi ŝati mi ĉiutago legi Esperanto-libro

Esp-a traduko

Lin Hong: “Mi ŝatas ĝin. Mi ĉiutage legas Esperantajn librojn.”

han-lingvo	安娜: “你 说 世界语 吗?”
HFA	Ānnà: “Nǐ shuō Shìjièyǔ ma?”
laŭvorta traduko	vi paroli Esperanto ĉu
Esp-a traduko	Anna: “Ĉu vi parolas Esperante?”.
han-lingvo	林 红: “我 常常 说 世界语。”
HFA	Lín Hóng: “Wǒ chángcháng shuō Shìjièyǔ.”
laŭvorta traduko	mi ofte paroli Esperanto
Esp-a traduko	Lin Hong: “Mi ofte parolas Esperante.”
han-lingvo	安娜: “我 很 高兴, 我 们 都 是 世界语者。”
HFA	Ānnà: “Wǒ hěn gāoxìng, wǒmen dōu shì shìjièyǔzhě.”
laŭvorta traduko	mi tre ĝoja ni ĉiuj esti esperantisto
Esp-a traduko	Anna: “Mi tre ĝojas, ke ni ambaŭ estas esperantistoj.”

Klarigoj

- 者 (partikulo): Unu el ĝiaj funkcioj estas montri personon, kiu profesie, daŭre, prefere aŭ ofte sin okupas pri la afero difinita de la radiko, se oni metas ĝin post adjektivo aŭ verbo. Ĝia alia funkcio estas montri adepton aŭ subtenanton de iu teorio, skolo kaj doktrino, kiel ekzemple 世界语者 (esperantisto).
- 每: Oni povas uzi ĝin antaŭ numeraloj kiel montratan pronomon por esprimi ĉiun ajn el la kolektivo kaj per ĝi oni ofte emfazas la samecon de la aparta individuo en la tuto. Ĝi povas aperi ankaŭ antaŭ nomoj, kiel ekzemple 每天 (ĉiu tago).
- 常常 (aŭ 常): Oni povas diri ankaŭ nur unu “常” sen ideografiaĵa ripeto. Tiu vorto estas adverbo signifanta “multe da fojoj unu post alia” aŭ “en konsiderinde granda nombro de la okazoj”. Oni metas “不” (ne) antaŭ ĝi por montri la negativecon. Plejofte oni uzas la formon “不常” (ne ofte) kaj malofte diras “不常常”.
- 们: finaĵo montranta pluralon. Oni aldonas ĝin al la singularaj personpronomoj aŭ nomoj kiuj prezentas “personojn” por formi plurecon. Ekzemple:
我 (mi) —> 我们 (ni)
你 (vi) —> 你们 (vi)
工人 (laboristo) —> 工人们 (laboristoj)
Sed “们” estas ne deviga en han-lingvo. Ekzemple oni ne uzas “们”, se troviĝas numeralo antaŭ la nomo.
- 都 (adverbo): Ĝi signifas “esceptante neniun kaj sendistinge”. La objektoj, al kiuj ĝi rilatas, devas esti pluraj kaj ĉiam troviĝas antaŭ ĝi. En tiu ĉi leciono ni uzas “ambaŭ” anstataŭ “ĉiuj”, ĉar la koncerna temo estas nur du homoj.
- En han-lingvo oni aldonas kelkajn partikulojn al vortoj aŭ frazoj por montri tonsen, modon k.a.

NOVAJ ATINGOJ DE LA ĈINA EKONOMIO

Je la fino de aprilo la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio anoncis, ke totala ĉina socia produktovalorado de 1983 atingis 1 105.2 miliardojn da ĵuanoj, je dekonon pli multe ol tiu en 1982. Laŭ la unuapaŝa kalkulo la nacia enspezo estis 467.3 miliardoj da ĵuanoj, je 9% pli multe ol tiu en 1982. La totala produktovalorado de industrio kaj agrikulturo kaj la produktokvanto de 33 ĉefaj produktaĵoj inkl. de greno, kotono, oledonaj semoj, karbo, nafto kaj ŝtalaĵoj atingis la normon difinitan de la Sesa Kvinjara Plano por 1985.

La komunikado montris ankaŭ la ĉefajn problemojn en la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo de Ĉinio, t.e. nesufiĉa liverado de energio kaj iuj krudmaterialoj, streĉaj trafiko kaj transporto, nekontentiga ekonomia efiko en produktado, konstruado kaj mon-cirkulado, daŭra deficito en la ŝtata financo kaj rapida prez-altiĝo de iuj varoj.

CENSO PRI LA ĈINAJ LABORANTOJ

Nun la nombro de la ĉinaj laborantoj konsistigas 51.94% de la totala loĝantaro de Ĉinio. La procento estas pli alta ol tiu en la evoluantaj landoj.

En Ĉinio rajtas labori nur 16-59-jaraj viroj kaj 16-54-jaraj virinoj. Nun 87.5% el ili estas laboruloj, kaj la ceterajn 12.5% konsistigas lernantoj kaj homoj sen labor-kapablo. Tio montras, ke la plejparto de la laboraĝaj ĉinoj havas okupon, kio estas malofta en la aliaj landoj.

73.2% de la ĉinaj laborantoj nun okupiĝas pri terkulturo, brutobredado, forstumado kaj fiŝado, sed el ili 97.7% estas terkulturistoj. Nun, pro praktikado de la nova ekonomia politiko nemalmultaj kam-

paranoj sin turnis al la vilaĝa industrio kaj transportado.

42 PROFUNDAJ ANKREJOJ KONSTRUATAJ ĈE LA ĈINAJ MARBORDOJ

Nun 42 profundaj ankrejoj por 10 000-tonelaj ŝipoj estas konstruataj en naŭ grandaj ĉinaj havenoj. Tio estos utila al la ekonomia konstruado kaj ekstera komerco de Ĉinio.

Tiuj novaj ankrejoj servos al ŝipoj por karbo, konteneroj kaj aliaj kargoj.

En Ĉinhŭangdaŭ, la plej granda karbohaveno de Ĉinio, oni konstruas du ankrejojn por 50 000-tonelaj karboŝipoj. Laŭ plano ili estos finkonstruitaj en 1985, ĉiu kun jara ŝarĝkapablo de 20 milionoj da tunoj. Tiam la totala ŝarĝkapablo de la haveno superos 45 milionojn da tunoj.

Nun en la tri grandaj ĉinaj havenoj Ŝanhajo, Tjanĝin kaj Hŭangpu estas konstruataj 7 ankrejoj por dekmil-tonelaj kontenerŝipoj. Finkonstruite, ili ĉiujare povos en-kaj elŝipigi 600 000 internacie normajn kontenerojn.

Ĉe la ĉinaj marbordoj nun estas 143 ankrejoj por dekmil-tonelaj ŝipoj, kiuj povas en-kaj elŝipigi 240 milionojn da tunoj da varoj ĉiujare.

MALMULTE ENERGIKON- SUMA VARŝIPO LANĈITA EN ŜANHAJO

La unua ĉina 20 000-tonela varŝipo Ĝenfen n-ro 5 estis lanĉita la 15-an de aprilo ĉi-jare en la Ŝanhaja Ŝipfarejo.

La ŝipo de racia strukturo povas ŝpari 20% da dizeloleo kaj transporti varojn je 25% pli multe ol la samtonelaj ŝipoj.

Ĝia ĉefa motoro estas farita de la Ŝanhaja Ŝipfarejo laŭ la internacia normo. Pli ol 95% de ĝiaj ekipaĵoj estas produktitaj de Ĉinio.

PROFESIA LERNEJO POR JUNAJ HANDIKAPULOJ

La unua ĉina profesia lernejo por junaj handikapuloj ekfunkciis

la 30-an de marto en Ŝenjang, pez-industria urbo en nordorienta Ĉinio.

La lernejo estas destinita por klerigi junajn handikapulojn kaj havigi al ili vivrimedojn.

Ĝi havas dek kursojn inkluzive de tajlorado, riparo de elektraj aparatoj, metiarto, akupunkturo, fotografio, hortikulturo kaj fundamentaj scioj. La lernotempo daŭras tri monatojn, duonjaron aŭ du jarojn. Oni vizitas la lernejon tri vesperojn ĉiusemajne.

Nun pli ol 200 junaj handikapuloj eklernis tie kvin kursojn.

51 SCIENC-TEKNIKAJ DOMOJ KONSTRUITAJ

De post 1980 en Ĉinio aperis 51 novaj scienc-teknikaj domoj kun totala plank-areo de 73 300 kvadrataj metroj. Krome, en la lastaj jaroj finkonstruiĝis 44 sciencaj domoj en iuj subprovincoj kaj municipoj. Nun 14 pliaj provincoj kaj municipoj konstruas siajn scienc-teknikajn domojn.

INTERNACIA GIMNASTIKA TURNIRO EN PEKINO

En la tria tagdeko de aprilo okazis la Pekina Internacia Gimnastika Turniro de 1984 en la Ĉefurba Sporthalo en tiu urbo. En la turniro partoprenis pli ol 90 gimnastoj el Bulgario, Kanado, la Korea Demokratia Popola Respubliko, Francio, DR Germanio, Hungario, Italio, Pollando, Rumanio, Sovetunio, Hispanio kaj Ĉinio. Post tri-taga intensa konkurso la ĉinaj gesportistoj gajnis la teamajn kaj individuajn ĉampionecojn en ĉiuj disciplinoj por viroj kaj virinoj. Krome la ĉinaj gimnastoj gajnis ankaŭ la ĉampionecojn de viraj grundgimnastiko, ĉevalado kaj senansa ĉevalado kaj virinaj ŝtupa paralelado kaj grundgimnastiko, dum la ceteraj kvin individuaj ĉampionecoj estis gajnitaj de la sovetiaj gegimnastoj.

Ĉinaj tonikaj manĝaĵoj

de ŜIN ĜJIGŬANG

DUM longtempa luktado por sin satigi la prapatroj de ĉinoj trovis bestojn kaj vegetaĵojn, kiuj povas servi kaj kiel manĝaĵoj kaj kiel medikamentoj. En la sepa jarcento jam aperis "manĝaĵa terapio" en la tradicia ĉina farmacio. Ĝi kombinas la tradician medikamenton, nutrologion kaj kuirarton en unu tuton, aldonante al manĝaĵoj sanigan kaj kuracan efikon. Kaj multaj postaj famaj kuracistoj faris pluan studadon kaj praktikon en tiu flanko, kaj certigis ilian tonikan kaj kuracan efikon. La ĉinaj tonikaj manĝaĵoj formiĝis sur la bazo de ĉina antikva "manĝaĵa terapio".

Laŭrecepte, ili konsistas el manĝaĵoj kaj drogoj. Oni elektas kaj kunmetas drogojn kaj manĝaĵojn laŭ principoj de la ĉina tradicia farmacio, por ke ili povu plene doni sanigan efikon.

La drogoj uzataj en tonikaj manĝaĵoj plejparte estas naturaj tonikaj drogoj, kiuj havas nenian pasivan efikon de kombinitaj medikamentoj. Ili estas mildaj, sekuraj kaj efikaj. Jam estis konstatitaj en longtempa klinika praktikado la efikoj de la tonikaj drogoj: ginsengo, angeliko, astragalo, raŭpofungo, licia bero. Ankaŭ esplorado de la moderna farmacio faris unuapaŝan pruvon pri iliaj tonikaj efikoj sur homaj organoj, kiel plibonigo de metabolo kaj nutro de ĉeloj, reguligo de nerva kaj endokrina funkcioj kaj plifortigo de imuneco.

Greno, viando, ovo, legomo kaj frukto devenantaj de la sama origino kun ĉinaj tradiciaj drogoj, enhavas nutrajn substancojn necesajn por metabolo de homa korpo. Iuj manĝaĵoj servas samtempe kiel drogoj, ekzemple, portulako. Ĉina antikva medicina literaturo notis, ke oni prenas ĝin kiel legomon por kuraci malsanojn. Klinika praktiko montris, ke portulako havas plurajn kuracajn efikojn. Ĝi havas inhibicion kontraŭ disenteriaj baciloj, tifaj baciloj kaj oraj stafilkokoj.

Saniga kaj kuraca efikoj de tonikaj manĝaĵoj sin bazas sur la teorioj de la ĉinaj tradiciaj medicino kaj farmacio. La ĉina tradicia medicino asertas, ke homo malsaniĝas nur tiam kiam eksteraj malsanigaj faktoroj efikas sur la homajn organojn. En kuracado doktoro devas meti sian atenton ne nur sur eliminadon de eksteraj malsanigaj faktoroj, sed ankaŭ sur plenan mobilizon de la interna malsan-rezista povo, reĝustigon kaj reguligon de la pertorbitaj funkcioj, kaj akceli resaniĝon per medikamentoj kaj manĝaĵoj. La tonikaj manĝaĵoj ĝuste celas plibonigon de internaj faktoroj de la korpo.

Estas diversaj specoj de tonikaj manĝaĵoj: pladoj, farunaĵoj, trinkaĵoj kaj bombonoj. En la produktado de tiuj manĝaĵoj iuj drogoj unue devas esti prilaboritaj per trempado, dispecigo, rostado kaj kuirado. Ekz., por prepari la pladon "fiŝo kun pecigita

gastrodia tubero", unue oni devas trempi la gastrodian tuberon kvin horojn en akvo, per kiu oni lavis rizon, por moligi ĝin, poste meti ĝin sur kuiratan rizon por ĝin vaporumi ĝis sufiĉa moliĝo kaj fine meti la dispecigitan tuberon kaj spicon en fiŝon kaj fari daŭran vaporumadon. Tiel la plado estas preta. Oni povas manĝi la gastrodiajn tuberpecojn kune kun la fiŝo. La menciita plado estas efika por kuraci kapturniĝon kaj spasmon de membroj kaŭzitaĵoj de visceraj malsanoj kaj neŭrastenion. Licia bero estas unu el la ĉinaj drogoj, kiu entenas proteinojn, sukerojn, karotenon, tiaminon, laktoflavinon, nikotinan acidon, askorbatan acidon, aminajn acidojn, alkaloidojn, glucidojn kaj aminojn, tiel ke ĝi havas tonikan efikon al renoj, hepatoj kaj okuloj. Tial per plado de viandstrioj kun liciaj beroj oni kuracas hepatajn kaj renajn malsanojn, kiaj lumba malfortiĝo, anemio kaj malfortiĝo de vidpovo.

Kompare kun ordinaraj manĝaĵoj, la manĝaĵoj kun drogoj estas tonikaj por la organoj de homoj, ĉu sanaj aŭ malsanaj. En la lastaj kelkaj jaroj oni plifortigis esploran laboron en tiu flanko, plimultigis specojn de tonikaj manĝaĵoj kaj senĉese disvastigis ilian aplikadon. Krom tonikaj pladoj, oni nun produktas ankaŭ sezonajn manĝaĵojn kontraŭ somera varmego kaj vintra malvarmego, kaj ankaŭ laco-rezistan kaj anti-oksigenmankan manĝaĵojn. Plua esplorado pri tonikaj manĝaĵoj, pri plibonigo de iliaj receptoj kaj teknologia projekto povos liveri utilajn manĝaĵojn al tiuj homoj, kiuj laboras sur alta montregiono, en alta aero kaj sub varmaj, malvarmaj kaj aliaj kondiĉoj.



Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceteton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Ĉiuj, kiuj sendas al mi almenaŭ 40 uzitajn poŝtmarkojn de sia lando certe ricevos la saman kvanton de p.m. de Nederlando. A. Fv. Leeuwen, Haakpad 35, 3151 XC Hoek v. Holland, Nederlando.

* 21-j. mastro de lingva Akademio s-ro Farshad-Hoseinkhani dez. kor. kun esperantistoj tutmonde. Adr.: ST. 217 No 6 Hafez, Shahin-Shahr, ISFAHAN-Iran.

* S-ro Mandana Saberi vol. kor. kun esperantistoj tutmonde. Adr.: Ferdosy 230-St. No 8, Shanin Shahr, Isfahan-Iran.

* Mi tre ŝatas korespondi kun ĉina esperantist (in) o de 17-25-jara. 24-j. lokomotivestro s-ro Bajaki Lurve, Kiskunfélegyháza, Jósikam-41, 6100-1-1.

* 14-jara Sándor Margit vol. kor. kun hungaro. Adr.: 4207 Ciurmani, Akádan No 1206, Harghit, Rumanio.

* 42-j. policisto dez. kor. Adr.: Alfonso Pijnacker, Tulpstraat 110, 2841 AE Moordrecht, Nederlando.

* 18-j. studento el Litovio volontas korespondas kun ĉinoj kaj alilandaj samideanoj, sendepende de aĝo k sekso. Li interesiĝas pri PM, E-movado, muziko. . . Skribu en Esp., angle, ruse, litove, Adr.: Gintaras Ziaunys, Zemaitijos 9-25, 235500 Mazeikiai, Litovio, USSR.

* Hungaraj gelernantoj vol. kor. kun ĉinaj gelernantoj en la aĝo de 10-14 jaroj. Gabor Magyarfalvi, H-2523 Sarisap Fo 97 u., Hungario; Pfluger Eva kaj Gregor Krisztina, H-2523 Sarisap Koztarsasag u., Hungario.

* S-roj Mafuila T. MAVOMO (27-j.) kaj Mavungu MVUMSI (39-j.) deziras korespondi kun tutmondaj ges-anoj pri muziko, kulturo, libroj, interŝanĝado, p.m., p.k. fotoj, kaj amikeco. Adr.: Esp.-klubo "La Verda Stelo", B.P. 122 Kuilu-NGONGO, Bos-Zairio.

* 28-j. fraŭlo dez. kor. tutmonde pri elektroniko k radio. Johano Starling, 617 Southland Av. Kalamazoo, MI 492, USA.

* 46-j. laborema sendungulo dez. kor. pri ĉiuj temoj, precipe: abelkulturo, poezia tradukarto, altraktado kaj greka antikveco. Louis Langlois, C.P. 67, Isle-Verte, GOL IKO, Canada.

* Bildlibrojn por infanoj interŝanĝu! Sed, ne tuj rekte sendu ilin al ni. Antaŭe skribu por pli bona kaj utila rikolto por ambaŭ al Esperanto-Rondo en Ikeda; Kawamura-kata, Muromati 5-13, Ikeda-si, 563 Japanio.

* S-ro Joao Batista da Silva dez. interŝ. leteron pri jurscienco laborista. Caixa Postal 1139, 50000 RECIFE (PE), Brazilo.

* Someraj Universitataj Kursoj interesiĝas pri universitatnivelaĵ kursoj. Kompetentaj universitatanoj faru proponon pri temo kaj momento (julio-aŭgusto 1985) al la sekretario de USK José Jacob, B.P. 62, LIEGE X, Belgio.

Bonvolu noti ke 33 kursotekstoj (KT) kaj 4 kajeroj (KJ) estas disponeblaj. Mendu la liston je la sama adreso.

* Mi vol. kor. kun ĉinaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. Adr. S-ino Gabriella Bartus, Uj élet u. 29/a, Kiskunfélegyháza, Hungario.

A DIAŬINTE la Flavan Riveron, la kontinua Granda Muro daŭre serpentas en montaro kaj kamparo de Ŝenŝji-provinco. Post 250-kilometra veturo sudokcidenten laŭ la muro mi atingis Julin, strategie gravan urbon faman en la ĉina historio.

"TRI TRANSLOKIĜOJ" DE JULIN

Antaŭ ol veni al Julin, mi jam multe aŭdis pri ĝiaj "tri translokiĝoj".

Laŭ onidiro, antaŭ tre longa tempo ekster Julin estis klara neelĉerpebla fonto. Dank' al la fonto kreskis sukaj herboj, prosperis arboj, paŝtiĝis aroj kaj aroj da bovoj, ĉevaloj kaj ŝafoj. En la kvina jarcento la huna estro Heljanbobo turisme vojaĝis al la loko, ekŝatis ĝin kaj fondis tie la regnon Daŝja. En postaj dinastioj oni senĉese malvirigis teron, kio detruis la flaŭron de Julin kaj iom post iom turnis la lokon en senhoman sablan maron. Kaj minacate de movsablo la antikva urbo Julin trifoje devigite translokiĝis.

Sed fakte neniam okazis la "tri translokiĝoj". Antaŭe Julin estis malgranda vilaĝo. En Handinastio (206 a.K. — 220 p.K.) ĝi fariĝis grava trapasejo inter la ĉefurbo Ĉang'an kaj aliaj lokoj norde de la Granda Muro. Ĝuste per tiu vojo la huna ĉefo Huhanja, kiu edziĝis al Ŭang Ĝaŭĝjun, venis al Ĉang'an por peti aŭdiencon ĉe Han-imperiestro. Poste la fortresoj norde de Julin estis konkeritaj de malamikoj kaj ne plu povis ŝirmi la mezan basenon de la Flava Rivero, tiam Julin fariĝis strategie pli grava. En Mingdinastio (1368-1644) oni fortikiĝis Julin kaj metis la ĉirkaŭajn kvin-ses guberniojn sub ĝian regadon, tiamaniere Julin fariĝis

Verda “Granda Muro”

de MEJ ĜI

unu el la strategie gravaj urboj ĉe la Granda Muro. Dume ĝi trifoje ekspansiigis suden. Tial konstatigis tri plivastiĝoj anstataŭ tri translokiĝoj.

Jam kripliĝis la urbomuro de Julin, sed ankoraŭ simetrie staras altaj sonorila kaj tambura turoj, kiuj ebligas ĝui la imponecon de la antikva urbo. Estas menciinda Ĝenbej-turo sep km. norde de la urbo, konstruita en Ming-dinastio por milita alarmo. La tri-etaĝa turo masonita ekstere el ŝtonoj aspektas grandioze. Laŭdire, en Ming-dinastio en Julin estis tre vigla foirejo, kie mongoloj kaj hanoj interŝanĝis varojn. La turo ja estis konstruita por protekti la foirejon.

OAZO EN LA SABLA REGIONO

Kvankam ne okazis tri translokiĝoj de Julin, tamen ĝi vere suferis de dezertiĝo en la pasinteco. Kiam en Ming-dinastio oni konstruis la Grandan Muron en norda Ŝenŝji-provinco, sin trovis vasta sabla etendo norde de la muro. Historia libro diras, ke post cent jaroj “la sablo amasiĝis ĝis parapeto sur la muro kaj la muro perdis la defendpovon”. La movsablo englutis kampojn, paŝtejojn, vilaĝojn kaj vojojn, formante sablan zonon 615 km. longan de oriento al okcidento kaj 24—126 km. larĝan de sudo al nordo.

Siatempe Heljanbobo mobilizis 100 000 homojn por konstrui la urbon Tongŭan 120 km. for de Julin kiel sian ĉefurbon (Tongŭan signifas regi dekmil generaciojn). La urbo estis multe fortikigita. Laŭdire, por konstrui la urbomuron, oni miksis grandan kvanton da faruno en morteron, pro kio la urbo estis konata ankaŭ kiel Blanka Urbo. Sed poste ankaŭ tiu urbo fariĝis preskaŭ nerekonebla pro atako de vento kaj inundo de sablo. La ambiciaj regantoj konstruigis tie la Grandan Muron kaj fortikigitan urbon, tamen havis nenian rimedon kontraŭ la furioza movsablo.

Hodiaŭ, kiam mi aŭte enveturis en Julin, mi vidis kamparon kraditan de altaj popoloj, iliajn verdajn foliojn en kontrasto kun ore flavaj rizkampoj, aŭdis gajajn ridojn disflugantajn kune kun la bonodoro de la rizo, sur la ombrata asfaltita vojo kondukanta al la gubernia urbo torentis veturiloj.


Oni diris al mi, ke la hodiaŭa aspekto de Julin rezultas el la sukcesa rego de la sablo. Mi decidis do viziti kontraŭsablajn batalantojn anstataŭ la ruinojn de la antikva urbo.

En la okcidenta parto de Julin mi trovis la lokan Kontraŭsablajn Instituton sur la iama dezerto.

En 1977 oni starigis tie la unuan kvar-etaĝan domon. Tiam tie estis nenio krom flava sablo kaj oni devis iri al la urbo por porti akvon. Post sep jaroj la instituto jam havas avangarde ekipitajn laboratorion kaj eksperimentejon, kun pli ol 900 laborantoj. Krom la instituto tie “fiksloĝis” ankaŭ aliaj 28 establaĵoj. Tie staras belaj etaĝdomoj unu post alia, kaj la loko fariĝis nova distrikto de Julin.

Pririgardinte la laboratorion de la instituto, mi venis al ĝia eksperimentejo riĉa je kontraŭsablaj procedaroj, el kiuj la plej ĉefa estas forstokulturo por kovri pli da lokoj per arboj. Ĝia tasko estas provizi kontraŭsablajn batalantojn per bonaj specoj de arbo- kaj herbosemoj. La eksperimentejo kun areo de pli ol 300 hektaroj aspektas kiel bela botanika ĝardeno en dezerto. Tie kreskas diversaj sablejaj plantoj. Akompanante min, iu grizhara inĝeniero konigis al mi: “Jen karagano (*Caragana korshinskii*), taŭga planto por senmovigi sablon, kaj el ĝiaj branĉetoj oni plektas korbon, jen hedisaro (*Hedysarum scotarium*), kvankam arbedo, havas dikajn branĉojn kaj bele floras. . .” Li diris, ke ili ne nur enkondukas bonspecajn sablejajn plantojn, sed ĉefe studas lokajn plantojn. Ili esploras pri kulturado de sovaĝaj

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



ĉerizuloj. Bone kreskas la arboj plantitaj printempe. La arbospeco preskaŭ pereinta reviviĝis en la dezerto.

Mi forlasis la kontraŭsablajn instituton kaj supreniris sur la plej altan lokon en la urbo. Tie mi sentis min kvazaŭ sur smeralda insulo. En la malproksimo la blua ĉielo estis tre klara, la senlima sabla etendo aspektis kiel milde ondetanta maro. Mi ekmemoris la figuran esprimon, ke maroj ŝanĝiĝas en moruskampojn kaj moruskampoj en marojn, per kio la ĉinaj antikvuloj priskribis la evoluon de la naturo. Jes, la esprimo estas tre konvena por priskribi ankaŭ la transformiĝon de Julin. Mi pensis, ke se oni pliriĉigos la enhavon de la historia libro, tio certe estos nova paĝo en la historio de Julin.

VERDA "GRANDA MURO"

Multaj sablejaj plantoj ekvivis ne nur en la eksperimentejo, sed ankaŭ en la tuta Julin. Tie arbozonoj kaj grandaj kaj malgrandaj arbaroj formis harmonian tuton de protekta arbozono.

Jam en la kvindekaj jaroj oni komencis starigi forstozonojn en Julin. Tiam la senspertaj indiĝenoj plantis ĉiaspeciajn arbojn sen-elekte. Sed furioza printempa

vento forrabis la vivon de tre multaj arboj plantitaj. En la sesdekaj jaroj oni plantis poplojn en granda kvanto. Sed pro nesufiĉo de akvo kaj sterko dekmi- loj da hektaroj da poploj fariĝis "nanaj maljunuloj" post dekel- kaj jaroj. Pasis dudek jaroj. La kontraŭsablaj batalantoj trovis forstokulturajn rimedojn konfor- man al la lokaj kondiĉoj. Ili ŝan- ĝis sian malnovan metodon kaj plantis unue sablo-salikojn (*Salix cheilophila*), amorfojn (*Amorpha fruticosa*) kaj aliajn arbojn rezis- temajn kontraŭ sekegeco, sterile- co kaj ventego kaj poste, kiam bridigiĝis movsablo, poplojn, sofo- rojn, pinojn kaj bonspeciajn her- bojn. Per la mikskulturado ili arbarizis la lokon kaj efike fik- sis la movsablaron.

En 1978 la ĉina registaro deci- dis starigi kontraŭsablajn arbozo- non etendiĝantan tra nordorienta, norda kaj nordokcidenta land- partoj kaj difinis tion kiel unu el la ĉefaj taskoj de la ŝtato. Tiel arbarizado de Julin iris en la grandiozan ŝtatan planon, kaj leviĝis amasmovado por arbo- plantado. Oni planis krei en Julin tri trunkajn arbozonojn kontraŭventajn kaj sablosenmovi- gajn kun totala longeco de pli ol 961 km. kaj areo de ĉ. 110 000 hektaroj. Oni jam arbarizis

80 000 hektarojn kaj krome faris laŭlonge de la Flava Rivero ju- jubarban zonan pli ol 300 km. longan kaj pomarban zonan kun areo de 10 000 hektaroj, kiuj kovris 29.7% de la sabla regiono de Julin. La loĝantoj kontente diris, ke la forstokulturo alportis al ili multe da bonoj, ekzemple ili multe malpli suferas de ventoj, sed ekhavas sufiĉe da fojno, ver- da sterko kaj hejtaĵo kaj rikoltas ĉiam pli da greno kun ĉiu jaro.

Mi havis plej agrablajn tagojn en arbara regiono kun malkom- pakta vojeto traveturebla nur por unu ŝipo. Tuj kiam nia aŭto en- iris la arbaron, ĝin kaŝis densaj kreskaĵoj kaj ĝian tegmenton skrapis de tempo al tempo iliaj branĉoj. Alportiĝis freŝa odoro de arbofolioj kaj humida grundo. Ni sentis nin kvazaŭ sur verda maro: verdaj folioj, verdaj bran- ĉoj, verda tero kaj eĉ la ĉielo verdiĝis.

Rigardante la ŝajne senfinan verdan koridoron, mi nature ek- memoris la kontinuan antikvan Grandan Muron. Ĝia parto en tiu loko estas kovrita de sablo. Ĉu la grandioza forstozono ta- men ne rolas kiel nova Granda Muro? Tie ĉi mi vidis la daŭron de la granda vivo de la antikva ĉina nacio kaj tio inspiris al mi la titolon por mia artikolo.

LA VERDA JULIN

Fotoj de ĈJU ŬEJBO




Verda arbara zono sur sabla tero

La antikva Granda Muro apud Julin






Arboj laŭlonge de kanalo



La ruino de por-
dego de la antikva
Granda Muro



Kamparana familio



Abunda rikolto de greno apud verda forsto




Ŝafaro paŝtata en arbaro



Tonika restoracio sub la medikament-vendejo Tongjentang en Ĉengdu




Portulako kun pistita ajlo



Viandstrioj kun liciaj beroj

Ĉinaj tonikaj pladoj

Fotoj de HE ŜIJAŬ



Ĉinaj medikamentoj por tonikaj pladoj: blankaj orelfungoj, ginsengo, ginkaj fruktoj, ruĝaj jujuboj kaj gastrodiaj tuberoj



Supo kun blankaj orelfungoj kaj kolomba ovajo



Vaporumita anaso kun raŭpofungoj



Fiŝo kun pecigita gastrodia tubero (*Gastrodia elata*)



世界语《中国报道》一九八四年第七期（本刊代号：二——九一五）北京市期刊登记证第692号

